

HAN RINER

(Ean Ryner)

INDIVIDUISMO

EN

ANTIIVECO

Historio kaj kritiko

el la franca originalo
tradukis Valo.

La Juna Penso

F 47340 Laroque Timbaut

115B

1977

3 FF

HAN RINER

(Ean Ryner)

INDIVIDUISMO

EN

ANTIIVECO

Historio kaj kritiko

el la franca originalo
tradukis Valo.

La Juna Penso

F 47340 Laroque Timbaut

115B

1977

3 FF

Antaŭa noto.

Dufoje mi plene parolis, antaŭ popola publiko, tiun historion pri la antikva individuismo.

La duan fojon mia prelego estis stenografiota. Ĉar la cirkonstancoj ne ebligis la efektivigon de tiu projekto, mi skribis, en la unua libertempo, la sekvantajn paĝojn. En la soleca silento de la kabineto, mi ne provis retrovi la oratoran tonon aŭ la akcenton de familiara parolado. Tamen, eble malnovaj aŭ freŝaj rememoroj iafoje kuntrenis min sur deklivon, kiun mi jam laŭiris; kaj la ton-unueco ŝajnos ĉi tie nesufiĉa. Mi estos feliĉa, se oni ricevos la impreson, ke parolo kaj skribo kunfandiĝas, almenaŭ proksimume, en rideto kaj familiareco pli ol en emfazo kaj deklamado.

Rapida historio de la antikva individuismo konsistigos ĉapitron de sufiĉe dika estonta libro, la Ridanta Saĝo (°). Sed unu ĉapitro ne estas verkita por si mem, kaj al mi ŝajnas, ke miaj ambaŭ provoj ne ĉiam estos senutila duoblaĵo. En La Ridanta Saĝo, mi pristudas la historion nur por ĉerpi el ĝi praktikajn kaj aktualajn instruojn. En ĉi tiu broŝuro mi estas iom pli senutilcela, iom pli scivola, iom pli historiista.

Hodiaŭ mi povis permesi al mi detalojn, klarigojn kaj elvokojn, kiuj, en la libro turnita al alia afero, estus estintaj trolongaĵoj.

(°) La Ridanta Saĝo (La Sagesse qui rit) aperis en 1928, kaj, elĉerpita, reaperis en 1959 kiel unua parto de pli ampleksa libro, postmorte publikigita, Le Rire du Sage (La Rido de l'Saĝulo).

Enkonduko.

Nenio estas tiel malfacila kiel la eltrovo de historia vero. Mi konas nur la Peloponezan militon, kiu povas - dank'al la eble unika konsciencia zorgo de Tucidido - esti rakontata kun ia certeco. La samtempaj dokumentoj malofte estas senprofitcelaj. Eĉ kiam la aŭtoro ne estas blinda, kaj ne konscie mensogas, eĉ kiam li diras tion, kion li kredas, tio estas realo misformita per liaj antaŭjuĝoj, per lia religio, per lia patrio, per lia partio, per liaj amikecoj kaj liaj malsimpatioj.

La historio de doktrino estas pli facila ol la aliaj historioj, kiam ni posedas la verkon de la doktoro (°). Ĉi tie ni fariĝas, preskaŭ senpasiaj, proksimume samtempaj kun la fakto. Nur proksimume. Necesas, ke ni atentu pri la ŝanĝiganta vivo de la vortoj; necesas diveni la aludojn, kiuj iam helpis kaj lumigis la leganton, kiuj nun ĝenas kaj konfuzigas nin. Ne grave. Mi forgesas la grandan koleron de Malbranĉo kontraŭ Spinozo, la azenaĵojn de cent universitatoj pri Spinozo; mi legas la Etiko'n kaj la Teologi-politika Traktato'n, kaj mi konas la penson de Spinozo, en la mezuro, en kiu mi estas kapabla penetri fremdan penson.

Pri la antikvaj individuistoj, ne ĉiam mi havas la esencan rimedon, kiun prezentas la studado de Spinozo aŭ Kanto. Pluraj, el la plej grandaj, nenion skribis. De aliaj, ofte la tekstoj estas perditaj. La malmultaj fragmentoj, kiuj venis al ni, estis elektitaj plejofte de malamikoj kaj kun polemika celo. En ĉiuj kampoj la antikvaj verkoj malaperis en terura proporcio. La individuistaj verkoj estis aparte mistraktitaj. Ĉu intence oni detruis ilin? Pli probable aŭ pli simple, ili malpli interesis la homojn, kiuj disponas monon kaj aĉetas librojn, ili estis malpli grandkvante reproduktitaj, kaj tiel malmultiĝis la ŝancoj, ke ili ĝisvenu al ni.

La penson de la plimultaj el la antikvaj individuistoj ni konas tra fremdaj raportoj. Oni scias, ĝenerale, kiel eĉ la plej granda bonvolo por fideleco lasas tiujn raportojn malfidelaj. Kiam, kun la tuta respekto, je kiu ni estas kapablaj, ni provis reprodukti la penson de najbaro,

(°) doktoro = doktrin-aŭtoro (N. d. l. t.)

preskaŭ ĉiam la najbaro akuzas nin, ke ni ĝin perfidis. La individuistaj pensoj, transmititaj de sociaj verkistoj, kredeble suferis strangajn misformigojn. Ne ĉiam la socia verkisto komprenis. Ifoje li strebis prezenti malpli portreton ol karikaturon. Malofte konformisto povas sen rideto prezenti nekonformistan penson. Tamen kelkaj en niaj individuistoj scipovis sin amigi. Ifoje, ankaŭ, kortuŝa morto projekciis sur iliajn vortojn lumon kaj gloron. Se la duon-disĉiploj, kiuj amis ilin, daŭrigis ami la Civiton, kiajn strangajn ŝanĝojn alportis en iliajn rememorojn la provpeno akordigi interkontraŭajn amojn ! Okazis, ke ili sociecigis eĉ tion, kio estas plej kontraŭ-socia...

Sed la homoj, kiujn mi pristudos, ĉu ili estas ja individuistoj ?

Ĉirkaŭ la komenco de la nuna jarcento, mi prezentis en plej diversaj medioj la penson de la plej famaj el ili. Preskaŭ ĉiam, iu Niĉe-ano deklaris, ke mi ne parolis pri individuistoj. La modo pravigis mian kontraŭdiranton. Kiam Brunetiere aŭ Faguet imagis, ke ili refutis Niĉe'on, ili fanfaronis, ke ili ruinigis individuismon. Laŭ la kontraŭuloj de Niĉe kiel laŭ liaj amikoj, ne ekzistas individuismo ekster Niĉe-ismo.

Neniam mi zorgas pri la modo. Spite ĉiujn kontraŭdirojn, mi daŭrigis nomi Sokraton, Epikuron, Epikteton kaj kelkajn aliajn individuistoj. Kaj mi proklamis min individuisto kiel ili.

Koncerne la Niĉe-anan kontraŭparolon, laŭ mia humoro de la momento, ankaŭ laŭ la valoro kaj la ĝentileco de tiu, kiu ĝin prezentis al mi, mi diversmaniere respondis. En iuj maldiligentaj horoj, mi kontentiĝis per nura rememorigo, ke la difinoj estas liberaj. Preskaŭ ĉiam mi aldonis, ke pli individuiste estas ne difini. La cinikistoj (°) kaj Niĉe egale evitas difinon, kaj egale scias kial : la individuo estas agnoskata kiel nedifinebla, eĉ de la plej dogmemaj kaj difinmaj el la logikistoj. Sed, laŭ ni individuistoj, ekzisto estas nur en la individuoj, en la apartaj aĵoj, en la unufojaj faktoj, kaj la tutan realon ni devas deklari nedifinebla. La ĝeneralaj terminoj - la vorto

(°)Mi provis, en la dua ĉapitro de La Veraj Interparoloj de Sokrato, rekonstrui la cinikan kritikon de difino.

individuisto kiel la aliaj - signas nenion eksteran al nia spirito. Ne nur mia koncepto rajtas esti diferenca de la via; sed, se oni ne kontentigas, almenaŭ de unu flanko, prononcante malplenajn vortojn, se vere estas, tie kaj tie ĉi, koncepto : ili ne povas eviti, ke ili estu diferencaj. Per la sama vorto ni esprimas, kiel rimarkas Antisteno, du seriojn de spertoj. Vi ne estas mi, mi ne estas vi, kaj ni ne renkontis la samajn objektojn en sama vicordo. Ĉu la individuisto ne estas la homo, kiu komprenas la neceson de diferencoj, kaj ĝoje konsentas pri ĝi ?... Se mi estus pli individuista ol vi, ĝustetial, ke mi konsentas en vi, ĝin repuŝante por mi, vian manieron kompreni individuismon, dum vi volas, simile al niaj komunaj malamikoj, trudi al mi kiel unikan certan tipon de individuismo. Individuista ortodokseco, lasu min ridi, kara ortodoksulo.

Iafoje, se oni estis tro agresema, mi ŝajnis, kvazaŭ mi mem fariĝus agresema. Mi aldonis, ke la libereco difini, aŭ pli ĝuste nomi, havas prudentajn limojn. Absurde estus tro malproksimigi la vortojn de ilia natura senco; kaj individuismo ne devenas de ego (°). Tial mi rifuzis la nomon individuisto al kiu ajn ne respektas ĉiujn individuojn. Sed, kiam mi batalis laŭ tiu metodo, tio ne estis sen ioma moko al la kontraŭulo kaj al mi mem.

Preskaŭ ĉiam mi preferas doni al la vorto sencon larĝan kaj relativan. Ne nur en ĉiu pensulo, sed en la plej sencscia el la homoj, mi trovas, miksitaĵn, elementojn individuistajn kaj elementojn konformistajn. Mi nomas individuisto tiun, en kiu la unuaj superas; tiun, kiu plej ofte disiĝas de la grego. Ne tre grave, kiam temas nur pri tiu ĝenerala kaj malpreciza nomo, ĉu oni flankeniras dekstren, ĉu maldekstren. Mi salutas kiel individuiston iun ajn, kiu en religiema epoko sin montras malpia; iun ajn, kiu en ortodoksa medio sin manifestas hereza; iun ajn, kiu en civitisma periodo scipovas ridi pri la civito aŭ malbeni la krimojn de la patrio.

Ekster matematiko, la individuisto provas nur neglekt-emajn difinojn de vortoj, sur kiuj li kredus danĝere apogi la premecon de demonstro. Li ankaŭ nemulte enparkigas la aferojn en rigidaĵ kaj definitivaĵ klasifikoj. Siajn klasifikojn, ĉiam provizorajn, li provas por plibone lumigi, en

(°) ego = mi(o).

daŭro de momento, tian aŭ alian aspekton de tia aŭ alia konkretaĵo. Do miaj klasifikoj de diversaj formoj de individuismo povos varii, sen ke mi ruĝiĝu pro ili. Tamen, al mi urĝas distingi miajn tendencojn disde la Niĉe'aj tendencoj. Jam dudekon da jaroj, mi kutimiĝis nomi la doktrinon de Niĉe, laŭ unu el la plej famaj titoloj de la granda lirikulo, la individuismo de la volo al potenco. Kaj mi kontraŭmetas al ĝi, en la nomo de Sokrato, de Epikuro, de Epikteto, ankaŭ en mia humila nomo, la individuismon de la volo al harmonio (1).

(1) Tiu koncepto estis, kiel oni diras, en la aero. En 1913 S-ro H.L. Follin, kiu certe nesciis pri miaj paroladoj en popolaj medioj, verkis tutan libron sub la titolo "La Volo de Harmonio". Li prezentis en ĝi individuismon tre malsimilan al la mia, en kiu ekonomio ne estas, kiel ĉe mi, flankelasita. S-ro Louis Prat, kiu ankaŭ nesciis pri mia klopodado, publikigis en 1923 libron profundan kaj ekvilibrantan, "La Religio de Harmonio", en kiu la penso ofte estas najbara al mia.

Noto de la aŭtoro en la 3a eldono, 1924.

Ĉapitro Ia.

La Sofistoj.

Historie, la unuaj filozofoj, en kiuj la individu-ista penso ekkoncias pri si mem, estas tiuj, kiuj donis al si la gloran nomon saĝuloj aŭ sofistoj.

Ni konas ilin tre malbone. Neniu el iliaj verkoj ĝisvenis al ni. Nur tra atakoj kaj refutoj ni povas distingi, kio ili reale estis. La plimultaj historiistoj, naive, kredas juĝi tiujn homojn, kunordigante la akuzaĵajn skribojn sen kritika kontraŭaĵo, kiuj restas al ni kontraŭ ili. Oni do ripetas kun amuza fido la parolojn de iliaj malamikoj Platono kaj Ksenofono. La timinda Platono, granda admiranto de Aristofano, estas genio komika ankoraŭ pli ol genio dialektika, preskaŭ tiom, kiom genio metafizika. Li desegnis multajn karikaturojn, kiujn la modernuloj, tro malicaj aŭ tro senmalicaj, obstine prenas por portretoj. La plej naiva el la universitatoj, kaj la plej respektema al tekstoj, ne kredas, ke La Nuboj prezentas la veran Sokraton. Sed li kredas, akceptante platonan pamfleton laŭvorte, ke li konas la veran Gorgias'on.

La komika potenco de Platono faris sofistojn treege vivaj, kaj konsekvence treege diferencaj. Supozu, ke granda komika poeto apartenanta al la klerikala partio, surscenigis la enciklopediistojn : li estos troiginta la doktrinajn diverĝojn; li estos farinta kontraŭdirojn el la plej etaj originalaĵoj en la esprimo kaj la plej etaj diferencoj de temperamento. Li prezentos al ni polvon da opinioj, kaj tiuj, kiuj ilin subtenos havos por liaj okuloj unu solan komunan punkton : nome malsincereco. Tiel Platono volis montri al ni la sofistojn. Lia akre maljusta genio kaj la universala stulteco efike kunlaboris : la nomo, kiu estis tiu de saĝo, fariĝis kruela insulto.

Konsistanta el personoj tre originalaj laŭ la formo de ilia talento kaj la detalo de ilia penso, la generacio de l'sofistoj tamen prezentas propran stampon, kaj marŝas en nete signita direkto. Ĝi komencas la grandan movadon kritikan kaj subjektivistan, kiu igos la grekan etikon pasige interesa kaj ĉiam utiligebla. La sofistoj returnas la

filozofian atenton de la objekto al la subjekto, de la mondo al la homa inteligento. Al ĉiuj endas apliki la belegan vorton, kiun Cicerono aplikis al la plej granda el ili, Sokrato. Ili laboris por "malsuprenvenigi la filozofion de la ĉielo al la tero". Ĉiuj scias, kiel Protagoras, ke "la homo estas la mezurilo de ĉiuj aferoj", kaj ke li devas serĉi la veron en si mem anstataŭ ol akcepti ĝin de fremdaj aŭtoritatoj.

Tiu doktrino, kiun ni konas nur pere de ĝiaj mallaudantoj, estas al ni prezentita en groteska troigo kaj dikigo. Protagoras eĉ ne instruis puran skeptikismon, - kio, cetere, ne estus pli ridinda ol multaj senmotivaj dogmismoj kaj tiaj platonaj ĥimeroj. Protagoras instruis virton kaj aktivan energion. La fama formulo: "La homo estas la mezurilo de ĉiuj aferoj" havas unu aŭ plurajn sencojn, ĉie kaj ĉiam verajn. Ĉiu faras al si mem sian scienccon, kaj tio, kion oni respekte nomas La Scienco, povas konsisti nur el personaj laboroj kaj individuaj eltrovoj kunmetitaj. Neniu el tiuj laboroj aŭ neniu el tiuj eltrovoj povus eviti la necesojn de nia naturo kaj tion, kion Kant nomas niaj formoj. Individuismo, kiu tiel havas sian lokon en ĉio, sola havas lokon en la scienco, kiu sola interesas la plimultajn sofistojn, tiu de la homa naturo (1). Eble mi alvenos al kelkaj konkludoj validaj por ĉiuj homoj, sed nur en mi povas mi ilin eltrovi, kaj ĉiu povas ilin eltrovi nur en si mem. En mi, mi trovas mian homan naturon tiel bone, kiel mian individuan naturon, miajn similaĵojn kun la aliaj homoj kiel miajn diferencojn.

Gorgias, disĉiplo de la Eleanoj, instruadis, en malsama formo, la samajn profundajn verojn, kiel Protagoras. Reale ne povus esti konata en absoluta maniero; kaj la relativaj konoj, kiujn ni prenas pri ili ne estas komunikeblaj. Do neniu devas pri ĝi konfidi al alies instruado; nur niaj personaj klopodoj kondukos nin al la ebla scio. Pri virto estas same, kiel pri scienco: oni povas nek instrui nek transdoni ĝin, ĝi estas nekomunikebla, kaj ĝi ne rekonas majstrojn nek disĉiplojn.

(1) S-ro Eugène Dupréel (La Sokrata Legendo) montris, ke oni devas escepti almenaŭ Hippias'on, genion enciklopedian kaj antaŭulon de Aristotelo.

La maljusteco de Platono kaj de la posteularo falsis la penson de Gorgias pri retoriko, kiel lian filozofian penson. Li rimarkis, ke la oratora arto estas, de si mem, indiferenta pri vero aŭ malvero : samaj argumentoj kaj samaj formoj de lingvaĵo povas servi por defendi bonan aŭ malbonan aferon, kaj homo lerta en ilia praktikado povas venkigi nature malbonan aferon. Oni insultis lin pro tio, ke li esprimis tiujn faktojn, kiuj estas nekon-
testeblaj, kaj kies formulado en la teorio de entimemo estos unu el la gloroj de Aristotelo.

Sed la centro de la sofistiko estas la granda etika konsilo, ke mi obeu al mia naturo, ne al la leĝoj kaj al la moroj. En la Gorgias, Kallikles asertas : "Pri la pli-multaj el la aferoj, la naturo kaj la leĝo estas inter si kontraŭaj." Trazimako, en la unua volumo de La Respubliko: "La registroj starigas kiel leĝon tion, kio utilas al ili. Juro estas nenio alia ol la avantaĝo de la plej potenca. Nur malsaĝuloj kaj malfortuloj sin kredas ligitaj per la leĝoj : la klerulo scias, kiel malmulte ili valoras." Hippias, en Ksenofono, kontestas, ke la leĝoj, tiel ofte ŝanĝiĝantaj, estas pli respektindaj dum la civito strebas ilin trudi, ol antaŭ ol ili ŝajnis utilaj al la leĝfarantoj, aŭ post kiam, ĉe uzado, tiuj rekonis ilin malutilaj. Li rezervas la nomon naturaj leĝoj al tiuj, kiuj ĉie kaj ĉiam estas egale akceptataj. Sed kiom da pozitivaj leĝoj prezentas tiun universalan karakteron ? Ĉu ne preskaŭ ĉiuj restas lokaj kaj tempaj ? Por ekzemplo, kial sin priokupi pri tiu malpermeso de la incesto, kiu, oni ne scias kial, ŝajnas tiel necesa al iu popolo, tiel ridinda al iu alia, kaj kiu, en Ateno, kondamnis la edziĝon kun sampatrina fratino, ne kun sampatra fratino ? En la Protagoras de Platono, tiu sama Hippias konstatas, ke la leĝo trudas la homon, kiel despoto, al multaj gestoj kontraŭaj al la naturo (1). Kaj la sofistoj, en la nomo de naturo, multobligas la kritikojn precizajn kontraŭ apartajn leĝojn. Alcidas forĵetas la leĝan diferencigon inter sklavo kaj libera homo. Cetere Aristotelo instruas al ni, ke multaj

(1) Priokupate pri la sola etika vidpunkto, mi neglektas en Hippias la sintezan kaj enciklopedian potencon, tiel lumigitan de S-ro Dupréel, op.cit.

estis la sofistoj, kiuj kondamnis la sklavecon kiel insulton faritan al la homa naturo. Likofron deklaras nobelecon imaga avantaĝo.

Resume, ĉiujn praktikajn problemojn solvis la sofistoj per distingo inter naturo kaj leĝo. Pri la cinikistoj, kiuj sekvas ilin en tiu kritikado, Zeller naive diras, ke "ili malkovris la punkton plej vundeblan de la antikva socio." Zeller, kredeble, opinias la modernajn kodojn proksimaj al la naturo.

Tiel, la sofistoj ja havas komunan doktrinon, kaj tiu doktrino estas individuista. Sed tiuj individuistoj estas individuoj. Kiam liberigintaj el la ĉirkaŭaj antaŭjuĝoj, ili sin manifestas, kiel atendeble, senlime diversaj. Ĉiuj estas malamikoj de la leĝo, pro amo al naturo. Sed ĉu la naturo ne estas riĉa aŭ kompleksa? En ĝi ili distingas diversajn potencojn. Unuj rigardas tiun potencon, aliaj tiun alian potencon kiel plej gravan.

En la maniero, laŭ kiu oni komprenas kaj amas la naturon, preskaŭ necese eniĝas konscia aŭ nekonscia antaŭdecido. Ĉu al la naturo de viva estulo, ĉu al la propra homa naturo mi volas obei? Ambaŭ kunplektiĝas en mi, foje por interkiso, ofte por batalo. Ekde kiam ili interluktas, de kiu el ili mia klopodo faros min aliancano? Laŭ Kallikles, mi devas obei al tio, kio estas plej profunda kaj universala en la vivulo. Laŭ la sofistoj Prodikus kaj Sokrato, al tio, kio estas en mi plej nobla kaj plej humana. Ambaŭ tendencoj retroviĝas laŭlonge de la tuta historio de individuismo. Ĉiam oni eltrovas individuisman de sento kaj individuisman de racio.

Jam en Kallikles la individuismo de sento havas la samajn ĝeneralajn karakterojn kiel en Niĉe. Por unu kiel por la alia, kio faras la fundon de la vivanto, tio estas la inklino superregi, la volo al potenco. Por Prodikus kaj por Sokrato, kio estas en mi plej altvalora, tio estas la racio kreanta harmonion. Ni vidos, ke ankaŭ individuismo de sento povas esti doktrino de volo al harmonio. Sed neniu sofisto ŝajnas antaŭvidi kaj skizi la delikatan majstro-verkon, kio estos epikurismo.

Ĉu ni konas Sokraton plibone ol la aliajn sofistojn? Pli malbone, eble. Ni estas malpli singardemaj kontraŭ la misformigaj speguloj, kiuj lin prezentas al ni.

Ne pere de kontraŭuloj ni lin konas, ĉar neniu serioze taksas la Nubojn. Ni konas lin pere de du disĉiploj amantaj kaj malfidelaj, kiuj volas fari lin simpatia al necesaj malamikoj, kaj utiligas lin por celoj malaj al liaj.

En Ksenofono aŭ en Platono, historiisto povas havi nur negrandan fidon. Ni tro scias, ke Ksenofono estis kapabla je intencaj forsilentoj, dubsencaĵoj, kaj eĉ rektaj mensogoj. Antaŭ ol iri al la kortego de Cirus la juna, li promesis al Sokrato, kiu malaprobis la vojaĝon, ke li konsultos la Delfan orakolon: li demandis al la orakolo, ne ĉu li devas iri, sed kion li devas oferi antaŭ sia ekiro. En la Anabazo - kiun li publikigis sub la nomo Temistogeno el Sirakuzo - li atribuas al si gravan rolon, kiun lia samtempulo, la serioza Eforo, komplete ignoras. Sen la diskreta gracio de lia stilo, oni emus nomi lin fanfarona soldato. Tiu supla, ridetanta, sugestanta verkisto, sed sen ia sincero, estis - se oni aŭdacas tiun anakronisman vorton - imperialisto: li revis pri potenca ĉefo kondukanta la unuigitajn Helenojn al la konkero de Azio. Tiu soldato, kiu havas ĉiujn stilajn elegantiaĵojn akordigeblajn kun mezaĉa inteligento, tiu Atenano, kiun lia gusto por strikta disciplino faris Spartano, tiu kvazaŭa profeto de Aleksandro estis nemulte kapabla kompreni individuistan penson.

Platono ja povis kompreni. Sed liaj prizorgoj ne estis tiuj de konsciencia interpretanto. "Kiom da aferoj dirigas al mi tiu junulo, pri kiuj mi neniam pensis", ekkriis Sokrato. Kiom ankoraŭ pli libere Platono lin misformis post lia morto; kiom platona li igis lin! Por ekzemplo, tiu teorio pri la Ideoj, kiun li subtenigas de Sokrato en tiom da formoj, Aristotelo sciigas al ni, ke ĝi estis tute fremda al Sokrato. Ne nur transforminte en metafizikiston saĝulon, kiu malŝatis ĉian metafizikon, ĉu li ne atribuis al li etikon pli platonan ol sokratan? Platono laŭdas en la Respubliko tion, kion li nomas "la bonefika mensogo". Apogante sur la aŭtoritato de Sokrato ideojn nesokratajn, aŭ foje kontraŭsokratajn, li aŭdakis kiom da mensogoj, kiuj ŝajnis al li bonefikaj?

Se Sokrato estus mortinta de natura morto, oni prezentus lin al ni, mi kredas, kiel groteskan personon, iel similan al la legenda Diogeno. Ne estus malfacile trovi

en la tekstoj komencon de la laboro, per kiu la pririditoj transformis la grandan priridanton en ridindulon. Ĝis en Platono oni rekonas spurojn pri ĝi. La emocia morto de la plej granda el la sofistoj deviigis la legendon : anstataŭ ridindigi Sokraton, oni lin utiligis kaj sociigis. Falsaj disĉiploj, kiuj amis lian personon kaj lian tonon pli ol lian penson, kaj kies amo estis pligrandigita per lia "pasiono" kaj lia ridetanta heroeo, akordigis sian amon kun siaj plej profundaj konvinkoj, kaj faris al Sokrato la donacon altvaloran, laŭ ilia kredo, de penso akceptebla por la samtempa opinio. Probable, tiu "idealigado" komenciĝis en ili nekonscie. Ĉu ĝi ne estis finita propravole de bonegaj advokatoj, kiuj havis negrandan respekton al vero ?

Ja pri vero tiam temis !

La Memorindaĵ ne respondas al la akuzparolado tia, kia ĝi estis prononcita de Melitus antaŭ la Heliastoj. En ili Ksenofono refutas verkon skribitan kelkajn jarojn poste, en kiu iu retor Polikrato donis al la akuzo beletran formon.

Al tiu Polikrato kaj al lia perdita verko oni konsentas nenian gravecon. Oni ridetante rimarkas, ke tiu retor estas ankaŭ la amuza aŭtoro de laŭdoj al la marmito, al la ŝtono, al la muso; la paradoksa apologiisto de Klitemnestra, de Helena, de Pariso, kaj eĉ de Buziriso, hommanganta tirano mortigita de Herkulo. En lia pamfleto kontraŭ Sokrato, samkiel en tiuj laŭdoj, oni malŝatas simplan stilekzercon.

Mi suspektas, ke la verko estis malŝatinda en alia maniero, pli abomeninda.

Kion la antikvuloj malŝatis sub la nomo ekzercoj, tio multe similas al verkoj, en kiuj ni salutas beletrajn senprofitcelajn laborojn. Tiuj laŭdoj al Klitemnestra aŭ al Buziriso, al Helena aŭ al Pariso, ĉu ne estas la ĝermoj de estontaj miletaj fabeloj ? Ĉu ili ne modifis la legendoj aŭ la historion, kaj ĉu estus troige jam vidi en ili, en la oratora formo tiam laŭmoda, kvazaŭajn fabelojn aŭ romanojn ?

Apud beletraj kaj ridetaj verkoj, sama homo povas fari verkojn senpere agajn kaj timindajn pamfletojn. Ĉu, tial ke Fenelono estas la aŭtoro de Telemako kaj de kelkaj beletraj fabloj, oni kredos, ke li ne rigardis kiel serio-

zan la doktrinon pri pura amo kaj la polemikon kontraŭ Bossuet ? Ĉu, tial ke Châteaubriand postlasis la Martiroj'n, Atala'n, Renato'n, la lasta Abencerago'n kaj la Naĉezoj'n, ni kredos, ke li estis seninflua al la milito en Hispanio ? Paul-Louis Courier ne ĉiam estas enmergita en Dafnis kaj Kloe. Lamartine kaj Victor Hugo sin miksas en la politikajn luktojn. Ĉu la malbonaj romanoj de S-ro Léon Daudet kontraŭas, ke S-ro Léon Daudet havas sangon sur la manoj ? (°)

Ne grava, la pamfleto de Polikrato ?... Ŝajnas al mi, ke alie sentis Ksenofono, kiu respondis al ĝi per kvar volumoj el la Memorindaj Interparoloj (de Sokrato). La Apologio de Platono kaj lia Kritono ja povus esti samdevenaj kaj batali la saman batalon.

Oni diras al ni : la Atenanoj pentis, ke ili murdis Sokraton, kaj kondamnis liajn akuzintojn. Ĉu popolo unu-anime pentas, kaj ĉu ĝiaj konvertiĝoj estas returniĝoj naivaj kaj kompletaj, kiel tiu de Saŭlo falinta sur la vojo al Damasko kaj releviĝanta Paŭlo ?...

Ke la sokratanoj forfuĝis de Megaro, kredeble ne estis sen iu motivo. Inter la postaj vojaĝoj de Platono, ĉu estas certe, ke neniu estis komplete aŭ parte motivita de persekutado ? Ksenofono, trudita rezigni pri sia natura patrio, incitiĝis kaj akriĝis, ĝis la grado foriĝi mal-amiko de Ateno.

Ĉirkaŭ la kadavro de Sokrato kredeble okazis longa, akrega batalado, ne sendanĝera.

Reveninte en Atenon, la sokratanoj rakontis en ĉiu okazo, la "pasionon" de sia majstro kaj la emocian kuraĝon de lia morto. Ili ekbruligis kaj subtenadis emocion. Ili atingis kondamnon al la akuzintoj. Ĉu kredi, ke la sukceso estis senlukte konkerita, kaj ĉu imagi, ke la batalo okazis en duelejo, sen ke unu aŭ alia partio havis kunliganojn ?...

La politiko kaptas ĉion. Eĉ se neniu el la disĉiploj estus aparteninta al la grandaj familioj kaj al la aristokrata partio, tiu partio estus utiliginta Sokraton kaj la levitan emocion kontraŭ la demokrata klano, kiu, hazarde, troviĝis kulpa pri lia morto. La kondamno al Anitus kaj

(°) Léon Daudet : naciista polemikisto, kiu per siaj artikoloj en "L'Action Française" havis certan influon en la murdo al la socialista kaj pacista oratoro Jean Jaurès (1914)

Melitus estis venko de la aristokratoj. Ĉu iam ekzistis partio, kiu scipovis ne ebriiĝi per la plej eta sukceso, kaj ne trouzi sian venkon? La demokratoj, humiligitaĵoj kaj minacitaĵoj, verŝajne sin returnis kontraŭ la sokratanojn. La pamfleteto de Polikrato estis unu el iliaj armiloj. Timinda armilo, se juĝi laŭ la emociigo de Ksenofono kaj laŭ la zorgo, per kiu li forĝis la ŝildon de la Memorindaĵoj.

Polikrato atakas Sokraton por prepari, kredeble, la proceson al la sokratanoj. En atako kaj defendo, sokratanoj kaj aristokratoj havas nun komunajn malamikojn; la neceso nedisigeble kunligas ilin. La aŭtoro de la Nuboj, minacata per la samaj minacoj, kiel ili, fariĝas sekura amiko. En la Bankedo, Platono simboligas la nunan veron, veron postan al Sokrato, fratumigante sian majstron kaj Aristofanon.

Ne nur kiel homan kaj politikan neceson oni divenas la vastan kaj daŭran bataladon; pri ĝi oni retrovas kelkajn spurojn en la forgesema historio. Kiam Platono sin prezentis antaŭ tribunalo por defendi sian amikon Habrias, Diogeno Laerco montras al ni denunciiston nomitan Krobilo, kiu spitarogante lin alparolas: "Ci, kiu venas helpe al alia, ĉu do ci forgesas, ke ci estas destinita al la sama ekzekuto, kiel Sokrato?"

Al la atakataĵoj sokratanoj sin prezentis elekto inter tri decidoj. Ili povis respondi al Polikrato, kiel Sokrato respondis al Anitus, kaj ricevi, kun la kuraĝo de sia majstro, la sorton de sia majstro. Neniu el ili, verŝajne, havis animon de martiro. Ili povis diri la veron: ke ilia amo al Sokrato ne malhelpas ilin pensi alie ol li rilate la demandon pri la leĝoj. Oni estus dubinta pri ilia sincereco kaj oni estus priridinta ilin kiel malkuraĝulojn. Ĉar ili havis la malkuraĝon vivi kaj ne povis solidarigi sin kun Sokrato; ĉar ili ne volis publike malhoni sin, publike malkonfesante sian majstron - nur unu solvo restis al ili: solidarigi Sokraton kun si kaj kun sia konformista doktrino. Tion ili faris.

Al Sokrato ili atribuis ne nur parolojn, kiujn Sokrato ne diris, kiujn diri Sokrato estis nekapabla, sed ankaŭ parolojn, kiujn li rifuzis diri. Pri la argumentado, mi suspektas, ke la Apologio de Platono ekzakte reproduktas la paroladon, kiun Lisias proponis al Sokrato, kaj kiun

Sokrato forpuŝis. Sed Lisias havis nur talenton. Platono havas genion. Ne nur la filozofian genion, sed la dramatan genion kaj la kapablon starigi vivajn estulojn. Al sia Sokrato li sciis doni la sintenojn, la gestojn, la ridetojn, la voĉon de la reala Sokrato. Li dirigis al li, flankenturnitajn al fremda kaj sendanĝera senco, multe da vortoj kaj frazoj, inter la plej timindaj, kiuj estis eliĝintaj el lia buŝo, kaj pri kiuj oni memoris. Dank'al la miriga ekstera vereco kaj al la zorga subtileco de la misformigoj, tiuj, kiuj konis Sokraton, kredis, legante Platonon, revidi kaj reaŭdi lin. Jes - ili sonĝis - tiel li ja parolis; jes, estas ja tio, kion li diris.

Platono kaj Ksenofono gajnis sian proceson. Ili pluvivis kaj savis la kamaradojn. Ni admiru ilin, ke ili sukcesis, kion li volis. Sed ni sciu, kion ili volis, kaj kiel indiferentaj ili estis al la historia vero. Ili batalis por sia vivo kaj por tiu de kelkaj aliaj, kaj ne domagis tion, kion la subtila Platono ie nomas "la bonefika mensogo". Ili parolas pri Sokrato, kaj igas lin paroli, nur kun zorgoj fremdaj kaj postaj al Sokrato. Kaj ili ne intencas informi nin, sed venki. Ni ne havu plu la naivecon preni tiujn advokatojn kaj tiujn senherosismajn akuzitojn por historiistoj.

En Sokrato oni kondamnis sofistojn kaj malamikon de la leĝoj. Tiuj, kiuj volis nek sekvi lin en la morto nek ŝajni lin malkonfesi, estis pelitaj fari el li amikon de la leĝoj kaj malamikon de la sofistoj.

Sed, dum lia vivo, antaŭ la transforma laboro de Platono kaj de Ksenofono, ĉiuj rigardis lin kiel sofistojn. Kiam Aristofano volas kontraŭbatali sofistikon, en Sokrato li ĝin enkarnigas. Eĉ en Platono mem, Sokrato sin konfesas disĉiplo de Prodikus, kaj oni scias, ke li sendis lernantojn al sia maljuna majstro. En la kvara volumo de la Memorindaj, Ksenofono senpripense prononcigas de li laŭdon al sofistiko, kiun li, ja kredeble, ofte ripetadis. Malfruaj komentistoj, nekapablaj akordigi tiujn parolojn kun la ideo, kiun ili faras al si kaj pri Sokrato kaj pri la sofistoj, volis trovi en ili ironian signifon. En Gorgias, Kallikles diras al Sokrato, ke li perfekte konas la esencan distingon inter naturo kaj leĝo, sed ke li mise ĝin aplikas.

Estas ja malfacile ne rekoni unu formon de la doktrino

komuna al ĉiuj sofistoj en la fama distingo de la "skribitaj leĝoj" kaj de la "neskribitaj leĝoj" kaj en la aserto, ke al ĉi-lastaj oni devas obei. Ankaŭ la alia granda marko de l'sofisto retroviĝas en Sokrato. La homo estas ja la mezurilo de ĉiuj aferoj laŭ tiu, kiu vidis nur unu donendan konsilon : "Konu cin mem".

Malgraŭ la leĝ-apologioj de Ksenofono kaj de Platono, estas certe, ke Sokrato malŝatis la religiajn leĝojn de sia tempo. En Eŭtifrono, kiu estas el la juneco de Platono, kaj ŝajnas sufiĉe fidela al la sokrata penso, preciza kaj kruela analizo montras, kio absurda estas en la koncepto pri sankteco; pririda lumo heligas la kontraŭdirojn de la religio, kaj Sokrato konkludas, ke nek de pastroj nek de dioj konvenas peti konsilojn pri konduto.

Malamiko de ĉiu politiko kiel de ĉiu pozitiva religio, li kondamnas, en Gorgias, ĉiujn ŝtatestrojn, eĉ tiujn, kiujn admiras la vulgularuloj. Kompreneble, liaj kritikoj, kiel tiuj de ĉiu individuisto, trafas senpere kontraŭ la socion, kiu ĉirkaŭas lin. Kun iom da naiveco aŭ da trompemo, oni povas ilin utiligi favore al alia formo de socio. Al kelkaj kristanoj lia kritiko de la religio ŝajnos kritiko de paganismo; ofte la aristokratoj Platono kaj Ksenofono reduktas lian kritikon de la socio al kritiko de la demokratio. Sed tro profundaj estas la motivoj de la kondamnoj : ili detruas ĉian politikon kaj ĉian organizitan religion.

Aristofano estus estinta neeviteble kunligano de la klasika Sokrato. Ja, en la Bankedo, Platono pelas la logikon ĝis tio, ke li faras el tiuj du malamikoj du amikojn. Sed tiaokaze, kiu do estus fabrikinta la Mubojojn ? Oni ne komprenas ankaŭ, kial la aristokrata registaro de la Tridek (°) peladas per senpardona malamo tiun malamikon de demokratio. Oni vere trouzis la hazardon, kiu murdigis Sokraton far popola registaro. Oni scias, ke la Tridek estus lin mortigontaj, kiam ili estis renversitaj. Inter li kaj ĉia registaro, la lukto estis neevitebla. Li estis malamiko de ĉiu, kiu soifas komandi aŭ obei, de la supera popolaĉo kiel de la malsupera popolaĉo. Tiel longe, kiam li vivis, li unuigis kontraŭ sin ĉiujn partiojn. Se li incitas la demagogojn per sia opozicio en la proceso al la dok generaloj, li rifuzas firdoni Leonon el Salamina al la

(°) La Tridek Tiranoj (N.d.l.t.)

Tridek tiranoj. Li mokridas la demokratecan lotumadon de la magistratanoj; sed la Tridek ŝajnas al li neniel plivaloraj ol la lotelektitoj: li komparas ilin al boviŝtoj, kiuj ĉiuvespere rekondukus al la stalo gregon malpli multopan kaj pli malgrasan. Li estas la sendependulo, kiu proklamās sian konsciencon, ne la dekstrajn konvinkojn aŭ la maldekstrajn konvinkojn.

Tiel, lia dajmono deturnis lin de ĉia politika agado. La justulo, kiu okupiĝas pri la aferoj de la Ŝtato, trovas en ili sian pardon sen profito por iu ajn. Lia sperto estas en akordo kun lia dajmono. Du fojojn - en la afero de la Arginuzaĵ insuloj kaj en la afero de Leono el Salaminio - la cirkonstancoj trudis al li agon aŭ abstinon politikecan. Ambaŭ fojojn, lia amo al justo metas lin en mortodanĝeron ne ebligante, ke li savu la senkulpulojn, kiuj malplaĉis al la demokrata registaro, la senkulpulon, kiu malplaĉis al la aristokrata registaro.

Li estas malamiko de ĉiuj pozitivaj leĝoj. Sed lia terminaro diferencas disde tiu de la aliaj sofistoj. Kion ili nomas naturo, tion li pli volonte nomas "la ne-skribita leĝo". Platono trouzos tiun apartaĵon.

"La ordon, kiu sin apogas sur trudo, ne sur persvado, mi nomas tiraneco, mi ne nomas ĝin leĝo." Tiel depreninte de la nomo leĝo ĉion, kio sin apogas sur artefaritaj sankcioj, li, sendube, lirike laŭdis la leĝon, t.e. la naturon kaj la konsciencon. Platono notas tiujn belegajn laŭdojn, kaj, forgesante la sokratan difinon de leĝo, li senhonte aplikos ilin al pozitivaj leĝoj, al la leĝoj de Ateno. Tia estas la artifiko, sur kiu estas konstruita la tuta Kritono. dialogo mensoga ekde sia titolo. Ja ne Kritono, malnova amiko de Platono, preparis la fuĝon de Sokrato kaj provis lin persvadi, sed Eskino, kiun Platono malamis kiel amikon de Aristipo. Platono ne hezitas falsi eĉ la faktan veron, tuj kiam temas kontentigi unu el siaj simpatioj aŭ antipatioj. Neglekteme, li ŝtelas de iu, kiun li ne amas, radion de gloro, por lumigi per ĝi vizaĝon, kiun li amas.

En praktiko kiel en teorio, Sokrato malŝatas la pozitivan leĝon. Kiam Kritias kontraŭmetas al parollibero leĝon, kiu jam pensigas pri niaj "malicegaj leĝoj" (°), Sokrato neniel modifas sian konduton. Vokite antaŭ Kritiason, li respondas al riproĉoj kaj minacoj per neglektemaj mokridoj.

(°) france : lois scélérates.

La metodo de Sokrato, kiel eksplikas ĉiuj instrulibroj, konsistas el du procedoj : ironio kaj akuŝigado.

Ironio, metodo de refuto, detruas la dogmismojn kaj ne anstataŭigas ilin. Ĝi fintrafas al la fama formulo : "Ĉio, kion mi scias, estas, ke mi nenion scias." Ĝi demonstras nur tion, ke la dogmisto estas malpli saĝa ol Sokrato : la dogmisto, kiu ankoraŭ nenion scias, kredas scii.

Do Sokrato ne instruas, kaj la libroj malprave nomas la akuŝigadon instrumentado. En la Apologio, Sokrato diras pri tiuj, kiuj lin aŭskultis : "Tiu, kiujn miaj kalumniantoj nomas miaj disĉiploj." Li aldonas : "Neniam mi estis ies majstro." Post kiam ironio estis forpelinta la asertojn elekstere venintajn, la akuŝigaj demandoj senpere kondukis al neniigo de doktrino; ili ekzercigis la junan amikon, ke li trovi en si mem ĉiujn etikajn verojn.

En Platono, Sokrato ŝajnas kulpi duoblan eraron. Li kredas, ke en ni dormas ĉiu scienco; ke lerni ion ajn, estas rememori; ke ni povas vekti, el memoro pli malnova ol nia nuna vivo, la konon pri aferoj, kiel la konon pri ni mem. En la Menono, lerte proponitaj demandoj igas malklerulon eltrovi la mezuron de kvadrato konstruita sur la hipotenuzo. Sed tio estas ingenia fantazio de Platono. La teorio pri la rememoroj estas korolaro de metafizikaj doktrinoj tute fremdaj al Sokrato. Tia, kia li ĝin komprenis, la formulo "Konu ĉin mem" kondamnis tiujn revaĵojn, kaj samtempe malŝatis ĉion, kio rilatas al kvadratoj kaj hipotenuzoj. En la buŝo de Sokrato, "Konu ĉin mem" signifas : "Ne zorgu pri eksteraj konoj", kaj ne, kiel en la buŝo de Platono : "Eltrovu en ci la universon". Kion ni devas serĉi en ni mem, laŭ Sokrato, tio estas nur la kono de la "ne-skribitaj leĝoj" kaj de la kondutreguloj.

Sed jen estas la eraro propre sokrata : la kono de la veraj leĝoj necese rezultigas obeadon al tiuj leĝoj. "Neniu estas propravole malica", kaj ĉiu kulpo estas eraro. Sokrato kredas, ke sufiĉas klare vidi por havi la forton marŝi, kaj rekte marŝi. Li nescias kelkajn el la homaj malfortoj. La scienco pri ni mem kaj pri mia bono estas unu el la fortoj, kiuj loĝas en mi; ĝi, tiu liberiga lumo, havas por batali kontraŭ plurajn sklavigajn potencojn.

Tiu eraro ne malhelpas, ke Sokrato estas unu el la plej admirindaj saĝuloj, kiuj iam sin manifestis, la patro en Okcidento de ĉiu individuismo de volo al harmonio. Liaj sam-

tempuloj ne eraris; ili konis tion, kion ili volis mortigi en li. Ili nete vidis, ke la saĝulo estas malamiko de la civitano. Ili kondamnis tiun, kiun Timono nomos "rezonisto kontraŭ la leĝojn kaj duon-Atenano". Eĉ ne duon-Atenano: "Mi estas - li diris - civitano de l' mondo, ne de Ateno."

Sed - oni argumentas - li plenumis sian militistan devon, kaj oni citas liajn farojn en Delium kiel en Potideo. Pluraj antikvuloj jam dubis pri la kampanjoj de Sokrato (1). Se tamen li vere plenumis ilin, ni almenaŭ rimarku, ke neniu aŭdacis laŭdi liajn batojn al malamikoj. En la bataloj, li faras savojn, ne murdojn. Laŭdire, li ĉi tie savis la vivon de Alcibiado; tie, tiun de Ksenofono. Kaj li mirigis, preskaŭ incitis siajn kunbatalantojn per strange nekutimaj manieroj, izoligoj, ekstazoj, kaj, oni asertas, dudekkvarhora starado sur unu piedo. Ŝajnas, ke tiuj rakontoj havas legendan, pli ol historian, karakteron.

La granda alportajo de la aliaj sofistoj kaj de Sokrato al la individuista filozofio, estas la atento deturnita de la objekto al la subjekto. La atento kritika kaj praktika. La sokrata "Konu cin mem" ne devas esti komprenata en senco metafizika kaj platona. Ĝi signifas nur: "Konu, kion ci volas, kaj konu, kion ci povas." Ĝi estas la necesa komenco de ĉia prudenta etiko. La posteuloj de Sokrato obeos al la granda konsilo: unuj, kiel Aristipo kaj Epikuro, kreas la kritikon kaj la disciplinon de sentemo; la aliaj, cinikistoj kaj stoikistoj, fondos la kritikon kaj la disciplinon de volo (2).

Ĉapitro IIa.

Aristipo kaj la Cirenanoj.

Aristipo el Cireno estas senpera disĉiplo de Sokrato, sed antaŭe li estis aŭskultinta aliajn sofistojn, kaj Ksenofono montras lin sentime diskutantan kontraŭ sia

(1) Koncerne la demandon pri la kampanjoj de Sokrato, legi en La Sokrata Legendo, la venkan kritikon de S-ro Dupréel.

(2) En la Veraj Interparoloj de Sokrato, mi provis starigi, vivantan, verŝajnan Sokraton.

lasta majstro. En la dialogoj, en kiuj Ksenofono implikas ambaŭ homojn, mi vidas nur pruvon pri la menslibero de la juna Aristipo; mi kredas, ke la plimulto el la detaloj estas reĵetenda kiel neverŝajna (1).

Ĝis la fino Aristipo konservos pli ol unu sokratan karakteron. Tiom, kiom Sokrato, li malŝatas la fizikajn konojn. Nur saĝo valoras esti serĉata. Kaj la sprita Cirenano komparas la scienculojn neglektantajn filozofion al tiuj pretendantoj al Penelopa, kiuj malfruiĝis en forlogado de servistinoj, kaj ne edzinigis la reĝinon.

Kvankam Ksenofono ridinde refutigas lin de Sokrato pri tiu punkto, Aristipo estas sokratana ankaŭ per sia malŝato al ĉia politiko, per sia firma decido konsenti nek al la sklaveco de submetiĝo nek al la sklaveco de potenco, sed sekvas mezajn vojojn, "ne ordonante, ne obeante, kaj ĉiam konservante la liberon, kiu kondukas al feliĉo."

Ankaŭ lia malŝato al patrioj lin proksimigas al Sokrato. En Epikteto, Sokrato sin deklaras indiferenta al la "terangulo, en kiun la destino ĵetis lian korpon". Aristipo estas tute indiferenta, ĉu li mortos en iu aŭ alia lando: "Ĉiam sama estas la distanco por iri al Hadeso." Li estas sokratano ankaŭ per tiu konvinko, ke la saĝulo sin distingas disde aliaj homoj per tio, ke li ĉiam same agas, kiaj ajn estas la pozitivaj leĝoj.

Sed li apartenas al alia skolo el sofistiko per sia aserto, ke "nenio estas denature justa, honesta aŭ hontinda", kaj ke sole "la kutimo kaj la leĝoj enkondukis tiajn distingojn."

Kvankam ni devas nin gardi konsideri Sokraton kiel aseton, Aristipo malproksimiĝas de li per sia proklamita gusto por plezuro. "Oni fariĝas mastro de ĉevalo, li sprite diris, nur rajdante sur ĝi".

Por obci al "Konu cin mem", li serĉas, kio plej profunda estas en li, vivanta estulo. Li kredas eltrovi, ke tio estas la amo al plezuro. Plezuro estas la sola celo, kiun li povas doni al la vivo. Kaj li provas analizon de plezuro.

Plezuro kaj doloro estas organaj movoj percepteblaj de la konscienco. Ĉu dolĉa estas la movo, jen estas plezuro;

(1) En La Veraj Interparoloj de Sokrato, mi laŭ verŝajno rekonstruis la pli gravan el tiuj du dialogoj.

ĉu perforta kaj malmilda, jen doloro. Plezuro kaj doloro estas du pozitivaj statoj, kaj estas malvere, ke unu estas nur la neado de la alia. Inter plezuro kaj doloro ekzistas stato de ripozo, kiu estas indiferenta.

"Ĉiuj plezuroj estas egalaj, kaj unu estas neniom pli sensebla ol alia". Sed pluraj estas pagataj per sufero. La saĝulo kalkulas kaj elektas. Se iu plezuro estas akompanata de nenia minaco pri doloro, sufiĉas liberiĝi de la deziro per ĝuado. Kiam la plezuro minacas kosti pli, ol ĝi valoras, la saĝulo malŝate flankenmetas ĝin, dank'al ia memrego. Do saĝo enhavas du kapablojn: inteligenton kaj nemastrecon. Inter la multaj anekdotoj pri Aristipo, kiujn transdonis al ni Diogeno Laerco, tiuj, kiuj prezentas filozofian intereson, montras la tutan ridetantan memregon, kiu estas la granda merito kaj la granda ekzemplo de la Cirenano. Oni konas lian vorton pri Laisa: "Mi ŝin posedas, mi ne estas de ŝi posedata." Ĉar junuloj miris, vidante lin eniri ĉe prostituitinon, li respondis, en la sama spirito: "La malbono ne estas eniri ĉi tie: la malbono estas, ne scipovi eliri." (1)

La senperaj aŭ malproksimaj disĉiploj de Aristipo rimarkigis sin precipe per sia spirita libero. Unu el ili, Teodoro, estis kromnomita la Ateisto. Li volonte ripetadis, post kaj antaŭ multaj aliaj saĝuloj: "La mondo estas mia civito". Li diris ankaŭ: "Sin oferi al la patrio, estas rezigni pri saĝo por savi malsaĝulojn". - Oni konas la laborojn de Evhemero kaj ilian kritikan aŭdacon. - La lasta Cirenano, kies nomo restis fama, estas Hegesias. Li tiris el la optimismo de Aristipo aparte pesimistajn konkludojn. Li rimarkis, ke plezuro estas io nekaptebla kaj fuĝanta. Krome, ĝi rapide produktas trosatecon kaj naŭzon. Tiel, neeviteble, la celo de la vivo estos maltrafita. Do la saĝo konsistas el rezigno pri la vivo. Kun elokventeco, kiun oni asertas efika, Hegesias predikis sinmortigon. La magistratanoj, timigitaj de lia grandiganta sukceso, fermigis lian skolon.

La konsekvencoj, kiujn oni povas tiri el doktrino (el ĉiaj doktrinoj estas tireblaj ĉiaj konsekvencoj) nek kon-

(1) En La Cinikaj Paraboloj (passim) mi estas pli severa al Aristipo: la necesoj de la fabelo trudis al mi la cinikistan vidpunkton.

firmas nek malpravigas ĝin, kaj Hegesias ne ŝajnas al mi refuto al Aristipo. La vera refuto al nekompleta filozofio, estas la filozofio, kiu plenigas ĝiajn malplenaĵojn. La vera refuto al Aristipo estas Epikuro.

Ĉapitro IIIa.

Epikuro

Ĉu Epikuro estis malpli insultita ol la sofistoj mem? Cicerono, kiu kredis filozofi, kiam la politiko ne plu akceptis lin - sed kiom Penelopa malŝatis tiun forĵetaĵon de la plej naŭza el la servistinoj! - deklaras epikurisman inda esti persekutata de la juĝistoj prefere ol refutata de la filozofoj. Oni divenas, kiel falsita kaj miskomprenita povas eliĝi el la civitana ekzameno penso alirita kun tiel malamikaj sentoj.

Tamen ni konas, per sufiĉaj tekstoj, la veran Epikuron kaj la veran epikurisman. Fama estas ne nur la poemo de Lukrecio, - prezento tre fidela kiel desegno, tre malfidela kiel koloro kaj kiel emocio. Sed Diogeno Laerco, kiu estis epikurano, lasis al ni resumon de la doktrino malpli malinteligentan ol la ceteraj prezentoj. Ni ŝuldas al li grandan dankon precipe tial, ke li transdonis al ni kvar verketojn de Epikuro mem: la Letero al Herodoto pri logiko kaj fiziko; la Letero al Pitokles pri astronomio; la Letero al Meneceo pri etiko. Ĉi-lastata estas al ni aparte altvalora. Tiel altvalora, eble eĉ pli, la malgranda kolekto de pensoj titolita: Esencaj Maksimoj.

Oni ofte rimarkis, ke la logiko de Epikuro kaj lia fiziko (la fiziko de la antikvuloj estas pli proksima de metafiziko ol de nia fiziko) estas nek originalaj nek sendependaj. Ili estas servantoj de etiko; ili devas kuracini el religio, montrante, ke la naturaj kaŭzoj sufiĉas por ĉion klarigi. Epikuro komisiis tiun preparan taskon al la atomismo de Leŭcipo kaj Demokrito, preskaŭ senŝanĝe.

Tiu klasika tezo enhavas grandan parton de vero. Tamen mi provus alporti en ĝin kelkajn amendojn, se mi ne interŝigus preskaŭ ekskluzive, ĉe Epikuro, pri tiu majstroverko kaj ĉiam utila verko, kiu estas lia etiko. Mi montrus, kiel Epikuro defendas, kontraŭ la determinismon, malnecesecon kaj liberon, defendas tion, kion Niĉe nomas: "Pro-Hazardo, la plej antikva nobeleco de l'mondo". Mi

aparte insistus pri unu karakterizaĵo de Epikuro, kiun ŝajne neniu rimarkis : lia sokrateca indiferento al scienco. Dum la modernaj liberpensuloj forĵetas la servutecon de dogmoj por adori la "novan idolon" kaj fari kredateston al la lastaj babiladoj de la scienco, al tiuj, kiujn ĝi hieraŭ ne prononcis, kaj morgaŭ ne plu prononcos, Epikuro manifestas sendependecon ambaŭflankan, se tiel diri, kaj preskaŭ egale malŝatan dekstre kaj maldekstre. Elpeli el nia penso la supernaturon, tial ke la supernaturo estas malbonfara, jen estas la sola servo, kiun li postulas de la scienco. Tiun servon li pagas per nenia sklaveco kaj eĉ per nenia amo. Fronte al iu fenomeno, li kontentigas sin per la aserto, ke ĝia kaŭzo estas natura; li indikas, ne sen neglektemo, la diversajn klarigajn hipotezojn, kiuj estas donitaj antaŭ li, aŭ kiujn li mem imagas; kaj li konsilas al la disĉiplo ne elekti inter tiuj hipotezoj. Ĉar eble li malĝuste elektus, kaj iu pastro, triumfante pro la eraro, asertus, ke tiu fiasoko de la scienco konfirmas la famajn verojn de la religio. Ĉio havas naturajn kaŭzojn. Se nur mi estas pri tio persvadita, estas neutile al mia feliĉo, ke mi konu la detalon de tiuj kaŭzoj, eĉ estas pli saĝe, ke mi ne zorgu pri tio. Tiu sinteno, diktita de prudento kaj malŝato, donas al la Letero al Herodoto kaj precipe al la Letero al Meneceo originalan akcenton, kiun oni devas rimarki, se oni volas vere koni la rideton de Epikuro.

Oni legas en Lukrecio komparaĵon de aparte klasika aspekto, kiu kredeble servis jam longe. Mi ne mirus, se iam oni trovus, ke ĝi fontas el Epikuro. Li mem trovis skiztraĵojn pri ĝi en Gorgias. En la unua formo, kiun ni konas pri ĝi, tiu similaĵo ŝajnas pli Sokrata ol Platona. Sendube Sokrato ĝin ripetadis sur la vojkruciĝoj de Ateno. Kaj kredeble li ne inventis ĝin; plifruaj saĝuloj verŝajne utiligis kiel etikan parabolon la barelon de la Danaidinoj. El tiu komparo de la homa koro al vazo, la epikurismo faris unu el la ĉefverkoj de simbolo, unu el la plej riĉaj plenaĵoj, kiujn konas filozofio kaj poezio. Bildo tiel riĉa, ke ĝi povas sufiĉi al la prezento de la tuta epikura saĝo.

En la ordinara homo, la vazo havas du difektojn : ĝi estas malpurigita kaj ĝi estas truita. La saĝo konsistas el purigo de la vazo kaj ŝtopo de ĝia fundo.

Kio eniras en la trivialan vazon, tio estas putrigita de diversaj timoj. Purigi la vazon, tio estas laksi ĝi sian koron el tiuj zorgoj. La fiziko montras al ni, ke ĉio okazanta havas kaŭzojn naturajn; la vera teologio instruas al ni, ke la dioj ne okupiĝas pri ni : ili ambaŭ liberigas nin de la unua kaj la plej terura el la timoj, la timo antaŭ la dioj. Ne ekzistas alia vivo ol la vivo, kaj la inferoj estas ridinda inventaĵo, sur kiu fondiĝas la kuirarto de la pastroj kaj de la sorĉistinoj. (Epikuro estis filo de magiistino, faristino de purigaj ritoj; en sia infaneco, kredeble, li aŭdis ŝin ridi pri la religia stulteco kaj moki siajn trompitojn). Por liberigi sin de la teruro pri la morto, sufiĉas tre simpla rezonado : la morto koncernas nek la vivanton nek la mortinton; tiel longe, kiel mi estas, ĝi ne estas; tuj kiam ĝi estas mi ne estas plu. El la timo pri doloro oni sin kuracas rimarkante, ke, se ĝi estas grava, ĝi ne daŭras; se ĝi povas daŭri sen mortigi min, do ĝi estas malgrava.

Tamen tiu lasta timo estas la malplej absurda. Por ĝin elpeli, eble ne sufiĉas rezonado, kiel ajn inĝenia. La purigado, sola, riskus ĉi tie resti senpova. Necesas ŝtopi la vazon. Poste, la maloftaj neeviteblaj doloroj estos facile dronigitaj en la abundo de la plezuro. Eĉ prosperos al ni transformi ilin en plezuron.

Efektive, la granda malbono de la trivialulo estas, ke lia koro estas ne nur venenita vazo, sed senfunda vazo. En ĝi ĉiu plezuro pasas rapide kaj neutile. Kaj la avido, en la malsaĝulo, kreskas pli rapide ol la akiraĵo. Kiel ripari tiun malbonon ? Kiel ŝtopi la fundon de la vazo ? Per analizo kaj kritiko de la deziro.

Ekzistas tri specoj de deziroj : iuj estas naturaj kaj necesaj, kiel malsato kaj soifo; - aliaj estas naturaj kaj ne necesaj, kiel la deziro variigi sian nutraĵon; - fine, aliaj estas nek naturaj nek necesaj, kiel la gusto pri honoroj.

La deziroj naturaj kaj necesaj devas esti satigitaj : ilia satigo forigas doloron kaj konfuzon, ĝi havigas plezurojn suverenajn kaj nepligrandigeblajn. Cetere, ili postulas malmultajn aferojn, kaj aferojn, ordinare, facile riceveblajn. - Satigite, la deziroj naturaj kaj ne necesaj ne pligrandigas la plezuron; ili nur variigas ĝin.

- Koncerne la dezirojn nek naturajn nek necesajn, endas rigardi ilin kiel la plej grandajn el ĉiuj malbonoj. Ili ne havas limojn; ju pli multon vi konsentas al ili, des pli multon ili postulas. Ĉi-lastajn dezirojn detruas en si la saĝulo.

Eraras Aristipo, kiu kredas distingi, inter la regno de plezuro kaj la regno de doloro, neŭtralan indiferentan teritorion. Aristipo ne konas la plej grandan el la plezuroj, la plezuron en ripozo. Se mia korpo spertas nenian suferon, mia spirito nenian maltrankvilon, mi povas "rivali pri feliĉo kun la dioj". Mi ja estas, en tiuj horoj de senmova pleneco, estulo, kiu ĝuas de si mem tuta kaj de sia regulritma aktiveco, estulo, kiu perfekte ĝuas de la esenc-konsista plezuro.

Origine, ne estas aliaj plezuroj ol korpaj. De korpaj voluptoj naskiĝas la spiritaj ĝojoj; sed tiuj idoj estas pli grandaj ol siaj patrinoj. La korpo sentas nur la nunan momenton; la spirito scipovas fari nunan feliĉon el la tuta estinto kaj la tuta estonto. Kiam la vazo estas prudente ŝtopita, ĝi lasas perdi neniun feliĉan rememoron, kaj mi povas verŝi en ĝin mil ĝojajn antaŭvidojn. La voluptoj, kiuj forpasas kaj forsvenas por la malsaĝulo, pluvivas en la spirito de l'saĝulo. Por li la vazo ĉiam estas plenplena. Per la memoro kaj la espero li pligrandigas la nunan volupton, kaj li en daŭra maniero glatigas ĝiajn malegalajojn. Ĉio falanta en tian vazon alprenas en ĝi la guston kaj la parfumon de feliĉo. Kiam amara guto venas sin miksi en tiun grandegan dolĉon, ĝi nur sukcesas spici ĝian guston kaj pligrandigi ĝian kvanton. Atinginte tiun punkton, la saĝulo estas liberigita de ĉiu doloro: neniun aparta sufero konfuzos lian vastan, plenaniman ĝojon. Epikuro mortanta pro renŝtona malsano skribas al Idomeneo: "En la plej feliĉa kaj lasta tago de mia vivo mi skribas ĉi tiun leteron. Mi sentas veziko- kaj ventrodolorojn tiel akrajn, ke ili ne povus pligraviĝi. Sed ĉio estas dronanta en la ĝojo, kiun verŝas en mian spiriton la rememoro pri miaj dogmoj kaj eltrovoj."

Tiel, englutita en la rememoro de la apartaj plezuroj kaj en la kontinuo de la esenc-konsista plezuro, la sufero ne plu ekzistas por la saĝulo. La Letero al Idomeneo pravas, ke Epikuro ne fanfaronis, kiam li diris: "Eĉ sur brulŝtiparo, mi ekkrius: Kiaj ĝuegoj!"

Eviti ĉiujn obstaklojn, kiuj kontraŭas al la pureco, al la kontinueco kaj al la pleneco de l'plezuro; timi nek la morton, kiu neniigas ĉian senton, nek la diaĵon, kiu ne zorgas pri ni; malŝati la doloron, malgravan, kiam ĝi povas daŭri, mallongan kaj memdetruan, tuj kiam ĝi estas forta; ne lasi forfuĝi la estintajn voluptojn, sed reteni kaj nutri ilin per diligenta rememoro; dronigi en tiun vastan oceanon la ridindan etecon de la nuno, kiam la nuno, izolita, estus sufero : jen estas la saĝo, jen estas la suverena bono, jen estas la subtila kaj delikata arto de la epikurano.

Ni ĉiam gardu nin juĝi laŭ la romanaj misformigoj la helenajn noblaĵojn. Militisto, administranto, politikulo, konstruanto de ekstero per ekstero, la Romano pezigas kaj rigidigas ĉiujn grekajn artojn ; tiujn, kiuj strebas al la belo de vivo. Inter la romana epikurismo kaj la helena epikurismo, la distanco estas sama, kiel inter tragedio de Seneko kaj tragedio de Sofoklo. La Romano, tuj kiam li ne estas malnobla, sin montras elokventa, deklamanta, iom teatreca, El la Epikura gracio li faras porkecan fiaĵon kaj aĉlokan filozofion. Aŭ, se li havas ian dignon, li faras el ĝi akran kaj potencan pesimisman. Nek per talento nek per genio li evitos unu aŭ la alian eraron. Horacio, adoranto de Aŭgusto, de faler-na vino kaj de belaj sklavoĵ, multmaniere naŭzus Epikuron. La tuta entuziasmo de Lukrecio al la Liberiganto ne liberigis Lukrecion de malesperaj sentoj, tiel malŝatindaj al la okuloj de la Liberiganto, kiel la religiaj malesperoj.

La helena epikurismo, la vera epikurismo, estas arto por esti feliĉa, ne arto por igi sin malfeliĉa. Ĝi estas esence - celtrafinta, sukcesa kaj definitiva kiel majstroverko - tio, kion skizis la Cirenanoj, kritikoj kaj disciplino de la sentemo. Restas al ni studi, en la Cini-kistoj kaj la stoikistoj, la kritikon kaj disciplinon de la volo.

Ĉapitro IVa

La Cinikistoj.

Kiel la Cirenanoj, la cinikistoj reagas kontraŭ la platonan intelektismon, kaj, daŭrigante Sokraton, ili konsentas intereson nur al praktiko. Kiel la cirenanoj ankaŭ, ili reagas kontraŭ la propre sokratan intelektismon, kaj repuŝas la aserton, ke ĉiu kulpo estas eraro.

La cinikismo estas kaj volas esti nur moralo. En metafiziko, ĝi deklaras la plej absolutan agnostikismon. Sed ĝian logikon rekonstrui estus interese. Ĝi estas, kontraŭ la nepravigitaj ĝeneraligoj de Platono, individua protesto. Laŭ Antisteno, nur individua povas esti realo. La ĝeneralaj ideoj esprimas nenion el la esenco de la aferoj, sed nur la penson de l'homo pri la aferoj.

Antaŭ ol sin ligi al Sokrato, Antisteno sekvis la instruadon de Gorgias. Pere de Gorgias, instruito de Zenono el Eleo, li ricevis la influon de la Eleanoj. Li akceptas ilian fundamentan postulaton, la neakordigeblecon de Unu kaj de Pluraj. Sed, dum la Elea skolo neas la realecon de Pluraj, kaj rigardas la individuajn objektojn kiel ŝajnojn, Antisteno neas la realecon de Unu kaj de la universalajĵoj.

En disputoj kontraŭ Platono Antisteno kaj Diogeno prezentis siajn ideojn pri logiko. Kaj ni konas ilin preskaŭ nur pere de la karikaturoj, kiujn faris Platono en pluraj dialogoj, la Sofisto, Ŭtideo, Teeteto. Spite lian insultadon al "Antisteno kaj la homoj de egala malklereco", lian malŝaton al lia ĉefa kontraŭulo kiel al "maljunulo malfrue studanta", la cinikistaj kontraŭdiroj al la teorio pri Ideoj, tre embarasaj por Platono, estas por ni konvinkaj. La individua objekto aŭ fakto, malŝatita de la Eleanoj kaj de la Akademio, forlokita en la teritorion de la Ŝajnoj, tamen estas ja, kiel asertas Antisteno, la sola realaĵo, al kiu ni havas ian kaptopovon. Ĝi estas senlime pli reala ol la platona Ideo, senkorpa esenco, kies ekzistado estas atestita de neniu solida pruvo, por pli ĝuste diri revo kaj iluzio kreita per la lingvo. Platono prenas nomojn por objektojn, kaj, kiel ajn brila estas lia konstruaĵo, ĝi estas farita, kiel ĉielarko, el rebriĵoj. Antisteno prave diras al li : Mi konas ĉevalojn, sed

ne la ĉevalecon; mi konas homojn, sed mi ne konas, ekster mia spirito, la ideon homan; mi vidis pokalojn sur tabloj, sed mi ne scias, kio estas pokaleco kaj tableco.

La kritiko de Antisteno trafas pli profunden. Ĉar la ĝeneralaj ideoj havas nenian objektivan realecon, kaj ĉar, krom la juĝoj pri identeco, ĉiu juĝo enhavas ĝeneralan ideon : korektaj estas nur la juĝoj pri identeco. Kiam mi asertis : Sokrato estas Sokrato, mi diris pri Sokrato ĉion absolutan, kion oni povas diri. Aldoni, ke li estas bona, ke li estas justa, ke li estas platnaza, estas mia rajto, se mi parolas senpretende, se mi ne celas la precizecon, kiu ebligas starigi rigoran rezonadon sur la bazo de solida kaj ekzakta juĝo. Ĉar Sokrato ne elĉerpas la ideon pri bono; la ideo pri bono ne elĉerpas la koncepton Sokrato; kaj la boneco de Sokrato ne estas tiu de aliulo. Kaj lia nazo diferencas disde aliaj plataj nazoj. Kaj lia justeco ne estas la justeco de Antisteno.

Sur difinoj oni konstruas demonstradojn. Nu, la individuo, sola realo, ne estas difinebla. Do en la konkreto oni povas nenion demonstri. Ĉiu diskuto estas vanta kaj ĉiu kontraŭdiro neebla. Kiu kredas min kontraŭdiri, tiu uzas la samajn vortojn, kiel mi, por difini aliajn aferojn, ol mi. La vorto resumas por mi serion da personaj spertoj; por li, malsaman serion da spertoj.

Se oni kontraŭdiras al Antisteno, ke li tiel malebligas ne nur la platonan dialektikon kaj la filozofian diskutadon, sed la lingvaĵon mem, li respondos, ke la sinceraj homoj povas paroli. Ili ja scias, pri kio ili parolas : pri serioj da spertoj, kiuj komplete koincidas kun neniu alia, sed kies nomoj elvokas iujn aliajn seriojn.

Krome, ili scias distingi inter la simplaj elementoj de kono kaj la kombinoj de tiuj elementoj. La simpla elemento, jen estas tio, kio estas tute difinebla. Tiaj estas la elementaj sonoj de la lingvo, kiujn oni povas nur aŭdigi, ne analizi. Kiam temas pri simpla elemento, mi povas nur prononci la nomon de mia sperto, esperante, ke ĝi elvokos ĉe la aŭdanto pli malpli analogan sperton. Se tiu senpera sperto mankas al li, mi signas al li iun similecon inter tio, kion li nescias, kaj io, kion li konas. Sed mi scias, kiel malneta kaj flirtanta estas tio,

kion mi diras; kiel onda kaj neekzakta tio, kion li aŭdas. La kombinoj de konoj similas al silaboj. Mi povas diri, el kiuj literoj la silabo konsistas. Mi povas diri ankaŭ la elementojn de la kombinaĵoj; se mi sukcesas ilin ĉiujn elciti, mi, en ebla mezuro, difinis. Sed tio estas "longa parolado". Tiel longa, ke ĉiuj difinoj, sur kiuj la dogmanoj starigas siajn konstruaĵojn evidentigas, en ekzameno, nekompletaj elcitadoj.

En la helo de tiuj eksplikoj oni relegu la mokvortojn, kiujn Antisteno kaj Diogeno el Sinopo direktas al Platono en Diogeno Laerco. Pluraj, kiuj ŝajnis infanecaj, alprenos veran kritikan intereson. Tamen, tiuj subtilaj malamikoj de ĉia subtileco interesas nin precipe per ilia etiko.

Etiko, laŭ ili, estas praktika scienco, aŭ, kiel ni diras, arto. Ĉiuj artoj povas esti instruataj; neniu arto instruigas per parolo. Sole la ekzercado formas la artiston aŭ la metiiston; oni fariĝas forĝisto forĝante; skulptisto, skulptante; saĝulo, saĝe vivante. Tamen, en ĉiu arto troviĝas intelekta parto, por kiu parolo ne estas senutila. Sed nenio estas pli simpla kaj mallonga, ol tiu intelekta kaj esprimebla parto. Pri la etika arto, ĝi resumiĝas en la distingo inter leĝo kaj naturo, kaj en la precepto: "Vivu konforme al la naturo". Diogeno, granda artisto, enfermas tutan sian sciencon kaj tutan sian praktikon en jena formulo: "Al la fortunon mi kontraŭmetas la kuragon; al la leĝoj la naturon; al la pasioj la racion". Kiu scias neglekti la leĝojn, malŝati la eksterajn akcidentojn kaj regi siajn pasiojn, tiu estas la libera estulo, la saĝulo, aŭ, se oni preferas, li estas la homo, kaj estas li, kiun Diogeno serĉas en plena tagmezo, kun lumigita lanterno.

Tiel malofta, tiu realigita homo, ke Diogeno ne renkontas lin eĉ en sia majstro, "trumpeto heroo, sed kiu ne aŭdas sin mem". Tamen ŝajnas, ke Antisteno vivadis en simpla kaj filozofa maniero, kaj oni nescias, kiujn malfortojn riproĉis al li lia granda kaj severa disĉiplo. En ĉia supozo, oni komprenas, kial la doktrino de Antisteno kontentigis la postuleman Diogenon, kaj la tono de la trumpeto ŝajnis al li sufiĉe "heroo". Antisteno diris: "La saĝulo ne regulas sian konduton laŭ la oficiale akceptitaj leĝoj, sed laŭ la virto". Li malŝatis la patrimon, kaj al tiuj,

kiuj fanfaronis esti filoj de la lando, li deklaris, ke li konas ankaŭ glorajn limakojn kaj privilegiantajn akridojn naskitajn sur la teritorio de Ateno. Li mokridis la religion, kaj se iu ensekretigito laŭdis antaŭ li la ĝojojn de la estonta vivo, li miris: "Kial do ci atendas por morti?" Li manifestis nenian estimon al la ŝtatoficistoj elektitaj de la popolo aŭ de aliaj ŝtatoficistoj, kaj, admirante la potencon de la leĝoj, li konsilis: "Dekretu do, ke la azenoj estas ĉevaloj". Ĉiuj liaj paroloj estas de individuisto, de liberulo, kaj, kiam oni riproĉis lin, ke lia patrino estis sklavino, li respondis: "Mi ne estas filo de du luktistoj, tio ne malhelpas min koni la luktarton". (1)

Diogeno el Sinopo estis ankoraŭ pli granda luktisto. Li restas ne nur la plej fama el la cinikistoj, sed eble la plej populara figuro el antikeco. Tion li ŝuldas precipe al la pitoreska maniero, en kiu li surscenigis la doktrinon de Antisteno, ĝin ilustris per kvazaŭaj vivataj paraboloj. Sufiĉas memori la plej famajn el tiuj anekdotoj por rekoni en li veran komikan genion.

Krates el Tebo estis la poeto de la sekto. Liaj versoj pri la Dupoŝsako (2) venis ĝis ni.

Luciano el Samosato famigis du aliajn cinikistojn: Menipon la satiriston kaj Peregrinon. Ĉi-lasto persono, duone frenezulo, duone ĉarlatano, vivis en la dua jarcento de nia erao. Kelkan tempon li konvertiĝis al la nova religio, kaj, laŭ diro de Luciano, "kunlaboris en la skriboj de la kristanoj". Reveninta al cinikismo, li en granda pompo sin bruligis ĉe la Olimpiaj ludoj, pretekste instrui al la homoj la malŝaton al morto. Sekve de tio li estis longatempe honorita de la popolo kaj faris multajn miraklojn.

La sinceraj cinikistoj, homoj admirindaj pro sia kuraĝo kaj sia pacienco, ne estis sen certaj sistemaj difektoj. Ili pelis malproksimen la amon al naturo, ĝis kondamno al ĉia civilizacio. Ili verkis verajn pamfletojn kontraŭ Prometeon, inventinton de fajro, kaj, pere de ĝi, de ĉiuj

(1) Miaj Veraj Interparoloj de Sokrato estas prezentitaj kiel tradukitaj el Antisteno. Laŭlonge de la tuta volumo, mi provadis paroli al la unu el la cinikistoj lian sentiman lingvaĵon, kaj konservi lian fronteman sintenadon.

(2) Oni trovos tradukon de ĝi en mia romano Patro Diogeno.

malfeliĉoj de la homoj. Kelkaj, kiel Diogeno, ŝajne rezignis pri ĉia kuirita nutraĵo. Ilia kriterio pri natureco estis iel strikta, kaj iafoje ili petis de la bestoj tro senperajn lecionojn. Ilia kondamno al pudoro, kiun ili neglektis analizi, kaj forĵetis entute kiel inventaĵon de la civito, estis iafoje tiel naŭza, kiel ridinda sin manifestas iu artefarita pudoro. La maldiskreteco de ilia propagando estis tia, ke ĝi povis forigi la delikatumojn. Ĝi ne estis ankaŭ sen etikaj malavantaĝoj por la propagandisto. Diogeno diris: "Kiel la muzikinstruantoj, mi troigas la tonon por realtiri al ĝi miajn lernantojn. Ĉiam troigante la tonon, la muzikmajstro riskas fariĝi malbona kaj triviala muzikistaĉo.

La stoikistoj korektos la cinikistajn mankojn. Eble ilia intelekta reago estos komence troa. Kun la tempo, pluraj el ili fariĝos, tre ekzakte, pli noblaj cinikistoj. Ankaŭ pli kompletaj: al la morala forto, al la sendependeco de la penso kaj de la konduto, ili kunigos vivan kaj profundan senton pri la homa frateco. (1)

Ĉapitro Va

La Stoikistoj.

Zenono, fondinto de l'stoikismo, naskiĝis en Cittio, en insulo Kipro. La urbo, jam longe helenigita, estis antikva fenicia kolonio. Zenono devenis de la unuaj koloniigintoj, kaj ni vidas liajn malamikojn kaj eĉ liajn amikojn, ŝokitaj pro tio semida, kio restis en li, daŭre mokridi lian devenon. La peripatetikoj (°), kiuj tamen fanfaronis esti la plej afablaj kaj bonedukitaj el la filozofoj, kriadis al li, kiam en sia juneco li venis diskrete aŭskulti iliajn majstrojn: "Ci vane cin kaŝas, ni

(1) Mi publikigis du verkojn de cinika filozofio pliĝuste ol pri cinika filozofio. La Psikodoro de la Vojaĝoj de Psikodoro kaj de la Cinikaj Paraboloj ne estas ortodoksa cinikisto. Li prezentas unu el la eblaj trapasoj de cinikismo al stoikismo. - Oni trovos en Patro Diogeno pitoreskajn detalojn pri la cinikista vivmaniero.

(°) peripatetikoj: el la greka peripatetikos, promenanto, laŭ la kutimo de Aristotelo, kiu instruadis, promene kun siaj disĉiploj. (N.d.l.tr.)

scias, ke ci estas tie, ŝtelante de ni dogmojn, kiujn poste ci iros vesti en feniciano modo."

Sed li estis ricevinta tute helenan edukadon. Li montris, jam en sia infaneco, tre vivan guston pri spekulativa filozofio, kaj li legis kun emocio la poemon de Heraklito.

El tre riĉa familio, li mem posedis pli ol mil talantojn, t.e. ses milionojn da drakmoj. Sed lia havaĵo estis riskita en mara komerco, kaj unu tempesto sufiĉis por lin ruinigi.

Sekve al tiu ŝippereo de liaj varoj, li venis al Ateno. Li estis jam mallonge en la urbo, kiam li hazarde sidiĝis apud libriska butiketo.

Libriska butiketo tiam estis magazeno sub libera ĉielo. La montrotablo portis la vendotajn volumojn. La vendisto, sidanta sur alta seĝo, laŭte diktadis. Skribis kaurantaj skribistoj, ĉiu produktanta po unu ekzemplero. Malriĉaj beletristoj ĉirkaŭstaris kaj aŭskultis legadon, kiu ne estis por ili destinita. Inter tiuj sciivoluloj, la malgranda Feniciano estas la plej atenta. Ĉar kion oni hodiaŭ diktas, tio estas la libro, en kiu Ksenofono kolektis belajn vortojn de Sokrato. Fine, ebria pro entuziasmo, la malgranda Feniciano ekkrias: "Kie oni renkontas homojn similajn al tiu Sokrato?" La vendisto, eble mokridanta, montras malgrandan ĝibulon pasantan ĉe la alia ekstremaĵo de la placo: "Sufiĉas, li diras, ke ci sekvu tiun viron." Kaj Zenono sekvas tiun viron.

La eta ĝibulo estis Krates, disĉiplo de Diogeno kaj plej fama el la tiamaj cinikistoj.

En la frekventado de tiu unua majstro Zenono kredeble gustumis vivajn kaj profundajn ĝojojn, sed kiujn baldaŭ konfuzis ia maltrankvilo, kiujn poste premeĝis amasiĝantaj elreviĝoj.

Li amis en Krates la tutan sokratan flankon, la fierecon, per kiu la cinikisto malŝatis la "armeajn generalojn", kiel kondukistojn de azenoj"; - la orgojlon, per kiu li proklamis: "Mia malŝato al gloro kaj mono, jen estas mia patrio"; - la inteligentan dankemon, kiu igis lin diri: "Mi estas civitano ne de Tebo, sed de Diogeno". Li amis la altecon, per kiu tiu viro respondis, kiam Aleksandro demandis lin: "Ĉu ci volas, ke mi rekonstruu cian urbon? - Por kio? Ĉu por ke alia Aleksandro povu denove

ĝin detrui ?" Li amis en Krates la potence spontanee volon, kiu igis lin forĵeti, kiel embarason, grandajn riĉaĵojn. "Ŝippereo, ofte diris Zenono, kondukis min al haveno". Krates estis plibona piloto : li mem eltrovis la rifuĝejon kaj albordiĝis en ĝin spite la ventojn.

Sed, apud tiuj motivoj de tenera admiro, kiom da detaloj ŝokis la delikatan Fenicianon ! Lian sentemon vundis la teatreca kaj burleska sinteno de la cinikistoj, tiu konstanta bezono allogi spektantojn kaj aŭdantojn, tiu maniero sin mem misformigi en la malsaĝa espero formi la aliajn, la absurda ofero de ĉia simpleco kaj la konsento esti nenio plu ol instrumento de propagando. Oni memoras la vorton de Diogeno : "Kiel la muzikinstruistoj, mi troigas la tonon por realtiri al ĝi miajn lernantojn". Krates troigadis la tonon ankoraŭ pli ol Diogeno.

La ĝibulo Krates estis amata de juna bela virino. Por instrui al la homoj, ke pudoro estas artefarita sento kreita de la civito, li sekskuniĝis kun Hiparkia publike.

Unu tagon, la malgranda Feniciano kontraŭvole ĉeestis la malplaĉan spektaklon. Multopa amaso enfermis lin apud la paro, kiu sub huoj kaj ridoj kuniĝis, kiel du klaŭnoj farus instruan paradon. Zenono, tute ruĝiĝanta, ĵetis sian mantelon sur la burleskajn geamantojn, kaj forfuĝis.

Kelkan tempon poste, Krates renkontis la malfidelan disciplon inter tiuj, kiuj akompanis Stilponon el Megaro aŭ Polemonon la platonanon. Li provis lin rekonkeri. Laŭ la teda kutimo de la cinikistoj, li kunigis la geston al la parolo, kaptis la junulon per lia vesto kvazaŭ por simbola perforto. Zenono kun firma mildo elliberiĝis, kaj sprite diris : "Ĉu ci ne scias, Krates, ke nur per la orelo estas kaptibla filozofo ?"

Dudek jarojn li vagadis de skolo al skolo. Nenie liaj maltrankviloj trovis ripozon. En si mem li fine eltrovis la principon pri harmonio. La materiojn, kiujn li pruntis de unuj kaj aliaj, li faris vere siaj per la oportuna kaj nova aranĝo, kiun li donis al ili.

La unua punkto, kiu frapas en li, estas - duone natura, kredeble, duone kreita per la reago kontraŭ ĉiuj liaj

majstroj - akra bezono fuĝi de la amaso. Por teni sian skolon, li elektis la Pecilon, portikon, kie mil kvarcent civitanoj estis mortigitaj dum la regado de la Tridek tiranoj, kaj kiun, de tiam, ĉiuj fuĝadis. Li tie promenadis kun malmultaj disĉiploj. Li sin donadis nur al kelkaj, kiujn li povis servi. Oni malicete rimarkigis al li, ke Teofrasto estas ĉiam ĉirkaŭita de multe da aŭskultantoj. "Jes, respondis Zenono malŝate, Teofrasto kondukas ĥoron pli multopan, sed la mia estas pli akorda". La vortoj akordo, harmonio revenas en ĉiuj liaj paroladoj. La akordon kun si mem, la grandan instruon, kiun li donis al si kaj al aliaj, li resumis en tiu konsilo: "Vivi harmonie".

Tiu formulo estas la plej bela kaj la plej individuista, kiun mi konas. Sed, kiel ĉiuj fortaj kaj densaj formuloj, ĝi restas malklara por tiuj, kiuj volas nenion kompreni, dubsenca por tiuj, kiuj ĉiam volas kompreni ion alian, ol kion oni diras. Kleanto malprave retroiris antaŭ la malfacilaĵoj levitaj de la peripatetiko kaj revenis al la cinikista formulo: "Vivi harmonie al la naturo".

Ne nur pro etikaj motivoj, ankaŭ pro intelektaj motivoj Zenono forlasis la cinikistojn. En la cinikismo, pli ĝuste metodo por vivado ol kompleta filozofio, la leginto de Heraklito ne trovis la metafizikajn kontentigojn, je kiuj lia spirito estis avida. Li konstruis por si doktrinon pli riĉan, kies ĉiuj partoj ŝajnis al li egale necesaj. Filozofio, li diris, estas simila al animalo: ostoj kaj nervoj estas la logiko; karno estas la etiko; animo estas la fiziko.

Lia morto estis harmonio simpla kaj diskreta kiel lia vivo. Li estis tre maljuna, kiam, forirante de la Pecilo, kie ĵus li ankoraŭfoje elparolis noblajn kaj plenajn formulojn, li falis. Falante li rompis al si fingron. Tiam, milde frapante al tero, li diris al ĝi tragikan verson, kiu signifas proksimume: "Ci ne bezonas voki min, mi venas propramove". Kaj, hejmiĝinte, li sin lasis morti pro malsato.

Kleanto, lia sekvinto, filozofo sen profundeco kaj sen originaleco, estas unu el la plej puraj herooj de la Portiko. Peza, mallerta, timema, sed subtenata per la nobla kontinueco de sia penso kaj de sia penado, li iam verkis

majstroverkon, unu el la plej plenaj kaj firmaj poemoj, kiujn lasis al ni la antikveco. En lia Himno al Zeŭso, en kiu, sub la nomo de la populara Dio, Kleanto gloras la stoikistan dion, la Ordon kunfanditan kun la Forto, racio mem fariĝas entuziasmo, kaj la parolo vibras kantante kiel la kordoj de liro: "Nenio fariĝas sen ci sur la tero, ho Dio, nenio en la etera ĉielo, nenio en la maro... Per ci, kio estas troa, tio revenas en la mezuron, la konfuzo fariĝas ordo, kaj la malkonkordo harmonio. Ci fandas tion, kio estas bona, kun tio, kio ne estas tia, kaj tiel kreiĝas en la tuto unika universala leĝo".

Krizipo, sekvinto de Kleanto, estas la granda genio de l'stoikismo. Li fortike rekonstruis, por jarcentoj, la sintezon iom malstreĉan kreitan de Zenono, kaj kiun Kleanto lasis diseriĝi. Oni diris: "Ne Krizipo, ne Portiko". Laŭ Krizipo, logiko, metafiziko kaj etiko formas tuton. Oni povas, indiferece, komenci la prezenton de la filozofio per unu aŭ alia. Oni povas ankaŭ prezenti la tutan doktrinon de logika vidpunkto, aŭ de metafizika vidpunkto, aŭ de etika vidpunkto. Sed estas neeble diri eksplicite unu el la tri aspektoj de la unika kaj harmonia scienco, sen ke la du aliaj estu diritaj por inteligenta aŭdanto. La potenca harmonio, la rigora interkorespondo de la diversaj partoj, la vivo unueca kaj supla, kiun li donis al la tuta sistemo frapis per admiro eĉ liajn kontraŭulojn.

La logiko de la antikvuloj estas nun nur kuriozaĵo kaj objekto de erudicio. Ilia metafiziko kaj ilia etiko estas daŭre vivantaj. Sed, diris Krizipo, metafiziko estas nur logiko de la universo; saĝo, logiko de la individuo.

En la universo kiel en la individuo, Krizipo rifuzas disigi la penson kaj la agon. Ĉu oni metas ĝin por la homo, ĉu oni plivastigas ĝin ĝis la granda Ĉiomo, la malnova demando nun nomata problemo pri la ĉefeco de volo aŭ de inteligento estas sensenca por la ortodoksa stoikisto.

La stoikista metafiziko estas potenca materialisma monismo. Ĉio ekzistanta estas korpa. Ekster la korpoj ni konas nur abstraktaĵojn, konceptaĵojn de nia spirito, nome la tempo, la spaco kaj la ĝenerala ideo.

Sed kio estas korpo? Estas tio, kio estas kune aktiva

kaj pasiva. Nenia pasiveco sen ia aktiveco; nenia aktiveco sen ia pasiveco.

La pasiva elemento de nia korpo estas tio, kion ni propre nomas materio. Al la aktiva elemento ni donas la nomon forto. Sed ne povas ekzisti materio, kiu ne estus kunigita kaj kuntenata per forto; ne povas ekzisti forto, kiu ne apogus sin sur kelka materio.

Kiam ni rigardas la tuton de la aferoj, ni nomas universo la unuecon de la materio kaj ni nomas Dio la unuecon de la forto.

En lasta analizo, la forto mem estas rigardebla kiel io materia. La stoikistoj reprezentas ĝin al si sub la naturo kaj ŝajno de fajro. Sed ilia dio ne estas fajro sekiga kaj detrua. Ĝi estas fajro vivanta kaj viviganta; ĝi estas fajro inteligenta kaj artista. Tiu strange subtila fajro penetras kaj ĉirkaŭas, kiel la etero de kelkaj modernaj scienculoj, ĉiujn partojn de la materio.

Dio, la artista fajro, estas nur inteligenta forto kaj inteligenta movo. Nu, ĝia movo estas duobla : ĝi estingiĝas kaj reekbrulas. Tiu ritmo travidiĝas en la universo per kuntiriĝoj kaj dilatiĝoj. Senmezura sistolo kaj diastolo etenditaj al la kosmo, jen estas la duobla esenca fenomeno, kiu produktas ĉiujn ŝanĝojn.

Alvenos horo - kaj ĝi jam alvenis senfinan nombron da fojoj - en kiu la tuta universo brulos. Tiam, ne plu ekzistos mondo, plu ekzistos nur Dio. Sed tuj Dio rekomencos estingiĝi por rekonstrui la universon (1). La duobla alterna movado neniam ĉesas, kaj la aferoj turniĝas en rondo, kiu komenciĝas en ĉiu momento, aŭ, se oni preferas tiel diri, kiu neniam komenciĝis. Ĉiu ciklo, ĉiu eterneco reproduktas ekzakte, rigore, sen io variigebla, la samajn fenomenojn en la sama ordo. Oni vidas, ke Niĉe, profeto de la Granda Reveno, nenion inventis.

Kia estas la mondo, tia estas la homo. Dio estas la penado kunetendita al la saĝulo. Por la stoikisto, la forto ne distingiĝas disde la racio. Sokrato ne malprave kredis, ke scienco kaj praktiko ĉiam kune iras. Kio nin trompas, estas, ke ni prenas iafoje por scienco tion, kio estas nur grimaco kaj ŝajno. Oni ne estas klera lignaĵisto tial, ke oni scipovas elegante paroli pri rabotilo kaj

(1) Mi provis poezie esprimi tiun doktrinon en la lasta el miaj Cinikaj Paraboloj.

segilo, sed tial, ke oni scipovas bone raboti kaj segi. Oni ne estas klera filozofo tial, ke oni elokvente parolas pri virto, sed tial, ke oni virton praktikas. La saĝulo estas kune la majstroverko kaj la faranto de la majstroverko.

Tiun majstroverkon oni povas kun Zenono nomi la harmonia vivo; kun la cinikistoj kaj Kleanto, la vivo harmonia al la naturo; kun la pitagoranoj, la imitado al Dio. Por Krizipo la tri formuloj estas egalvaloraj. Se mi estas en harmonio kun mi mem, mi estas necese en harmonio kun la naturo, kaj mi estas simila al Dio : mi kreas mian harmonion, kiel Dio kreas la universalan harmonion.

Harmonio, formo, belo, jen estas ĉio grava. Sed ne ekzistas belo, kiu ne estas la beleco de io; ne ekzistas formo, kiu ne estas la formo de iu materio.

En iu senco, la materio de mia vivo estas indiferenta. Fidiaso estas tiel granda artisto, kiam li modlas argilon, aŭ kiam li frapas marmoron per sia ĉizilo. Sed ekzistas materioj pli plastikaj ol aliaj : inter la aferoj, kiujn mi deklaras indiferentaj, kiam mi komparas ilin kun la sola bono, la beleco de mia vivo, estas iuj, kiujn mi nomas preferindaj, ĉar ili estas iagrade celendaj, tuj kiam tiu celado ne malutilas al la suverena bono. La aferojn kontraŭajn al la preferindaj mi evitas, kiam mi povas sen malbeliĝo.

Oni diris, ke la stoikistoj unuavice uzis la vorton devo. Estas eraro aŭ konfuzo. En la stoikismo oni renkontas nenion, kio similas al la servutema moderna koncepto de devo. Por la stoikistoj, mi devas nenion al iu ajn, mi ne havas denaskajn ŝuldojn, mi ne elportas devigon, mi ne estas sklavo de fremda potenco, konkreta aŭ abstrakta, persona Dio aŭ kategoria moralordono. Mi estas natura estaĵo, kiu plenumas naturajn funkciojn. La stoikista vorto, kiun oni tradukas per devo estas korekte tradukebla nur per funkcioj. Aliel la stoikistoj estus parolintaj, en la sama tono kiel pri la devoj de l'homo, pri la devoj de la animalo aŭ de la planto.

La homo havas vivon vegetan kaj vivon animalan. Li do plenumas ĉiujn funkciojn de ĉiu vivanto. Sed li havas krome proprajn funkciojn, kiel lerni, kiel ami la aliajn homojn. "Estas propraĵo de l'homo, diris la stoikistoj,

esti filantropo". Kaj plie : "Nature estas al la homo ami la aliajn homojn, ne pro profiteco, sed elkore". Kaj la bela vorto, kiun la unuaj kristanoj noble uzadis, kiun la kristana dekadenco malnobligis ĝis doni al ĝi la sencon de almozo, la vorto, kiu diris la amon kun ĝia tuta akompano de graciaj, de ridetoj, de delikategaj spontaneajoj, la vorto karitato, ĝin de la stoikistoj pruntis la kristanoj. La stoikistoj estas en Okcidento la unuaj, kiuj proklamis, kiel unu el niaj plej noblaj funkcioj, la vastan "karitaton de la homa speco".

Tiu larĝa sento detruis en la stoika animo la respekton al patrio, kiu kulpas la duoblan krimon subpremi la individuon kaj disigi fratojn. Zenono, kaj post li ĉiuj stoikistoj, rigardas la tutan universon kiel la civiton de la homoj kaj de la dioj; ili gloras la naturan parencecon, kiu unuigas en unu sola popolo, en unu sola familio, ĉiujn, kiuj kunposedas la racion.

Regule plenumadi miajn naturajn funkciojn, tio ne sufiĉas por fari el mi belon kaj feliĉon vere homajn. La animalo, kiu manĝas, kiam ĝi malsatas, kaj trinkas, kiam ĝi soifas, ne estas saĝulo. Ankaŭ ne la homo, kiu instinkte instruigas pri vero aŭ instinkte amas siajn similulojn. Necesas plie, por ke mi ĝuu la harmonion, ke mi plenumu miajn naturajn funkciojn cele al harmonio. Saĝo estas bello en lumo, harmonio sin konanta. Nur la saĝulo estas feliĉa. Li vivas en la daŭra ĝojo senti sin en akordo kun si mem, en akordo kun la universo, simila al Dio. Li vivas en la daŭra fiereco scii, ke lia harmonio estas lia verko.

Kiu estas la unua natura funkcio kaj la plej esenca inklino de la vivanto ? Eraras Kalikles, kiu kredas, ke ĝi estas la amo al konkero kaj superregado. Eraras Epikuro, kiu prenas la signojn de sano por sano mem, kaj asertas, ke la vivanto celas plezuron por plezuro.

Nu, tiuj inklinoj ne estas unuaj. Kio estas unua, estas la bezono konservi mian estaĵon, ŝirmi tion, kio mi estas. Nu, kio mi estas ? Mi ne estas koro aŭ cerbo, ventro aŭ membroj. Mi estas tuto. Tiun tuton mi defendas kontraŭ la malamikajn fortojn. Mia unua inklino estas ŝirmi, sendube malriĉan kaj nemulte konscian, sed kapablan pliriĉiĝi kaj intelekte ĝui pri si mem, harmonion.

La inklino al mia bono, la inklino konservi kaj real-

igi min, misformiĝas en mi, se mi estas senprudenta. Ĝi fariĝas la kvar pasioj, troaj movoj, eksteraj al la belo-normo, kies kriaĉa malbelo strebas al falsaj bonoj aŭ malkuraĝe fuĝas ŝajnajn malbonojn. La senprudentulo, ĉu li estas nun senigita je falsa bono, ĉu li estas sklavo de nuna falsa ĝuo, nevole spertas malgajecon aŭ plezuron. Se la posedo de falsa bono aŭ ĝia manko estas rigardata en estonteco, la senprudentulo suferas pro deziro aŭ timo.

La saĝulo ne estas sensenta. Anstataŭ pasioj, frenezaj kaj troegaj baraktoj, li spertaj amojn, belajn kaj belritmajn movojn. Nenio en li respondas al malgajejo, ĉar la saĝulo ĉiam posedas la veran bonon, lumon kaj forton, racion kaj bonvolon. Sed anstataŭ la plezuro kaj ĝiaj etaj skuoj, li spertas la ĝojon, la daŭran ĝojon, similan al suprenirado en helo. Anstataŭ la freneziga timo, li spertas la ridetantan singardemon, kiu ĉiam zorgas pri la interna trezoro. Fine, la penado de l'saĝulo neniam postulas ion neeblan aŭ dubeŝancan, celas nur tion, kion ĝi povas ĉiam realigi, la belecon mem de la penado. Kia ajn estas la rezulto ekstera de la batalo, kio estas la vivo de l'saĝulo, la vivo de l'saĝulo estas konstanta venkado. Tial la saĝulo ne deziras, li volas.

Oni ja vidas, kio superregas en la stoikismo, tio estas la sento pri la unueco de la estulo kaj de ĝia akordo kun si mem. Koni la harmonion, kiu mi estas, ĝin pli kaj pli realigi, kaj, laŭmezure kiel mi ĝin pliperfektigas, alprenadi pri ĝi konscion pli kaj pli netan kaj larĝan, surgrimpi, iamaniere, sur ĉiun el miaj konaĵoj por agi pli alte, sur ĉiun el miaj agoj por vidi pli vaste, jen estas la esenco de la doktrino.

La Romanoj donas al stoikismo rigidan, streĉitan kaj teatrekan karakteron. Tamen stoikismo estis pli taŭga ol epikurismo por ricevi sen malbeligo la romanan influon. La romanaj epikuranoj povas esti intereseĝaj studobjektoj por la psikologo kaj la etnologo; neniu estas etike interesa. Malgraŭ la foresto de certa gracio kaj la manko je rideto en la heroeco, pluraj romanaj stoikistoj restas admirindaj ĉefverkoj.

Ne tia estas Seneko. Sed laŭ kiu mezuro Seneko estas stoikisto? Li estas stoikisto ĉiufoje, kiam li diligente strebas al tio; li ĉesas esti tia, tuj kiam li for-

gesas diligenti kaj sin allasas al sia naturo.

Neniu naturo estas pli ŝanceliĝa ol lia.

Li belege laŭdas stoikismon. Li delikate ĝin laŭdas pro ĝiaj plej humanaj aspektoj. "Neniu sekto estas pli bonvola, pli milda, pli amika al la homoj, pli okupita pri la komuna bono : en ĝi oni ne nur celas esti utila al si mem, sed zorgi pri la universalaj interesoj kaj pri ĉies interesoj". Por la stoikisto, "ĉie, kie estas homo, estas loko por bonfaro". Tiu bela formulo el De Vita beata, la tuta De Beneficiis havas preskaŭ neniun alian celon, ol ĝin elvolvi kaj lumigi : "Nia plezuro estas bonfaro, eĉ se peniga, se nur ĝi faciligas alies penon; eĉ se peza por niaj bezonrimedoj, se nur ĝi malpezigas la bezonsuferon kaj la nesufiĉecon de iu alia".

Kiam li tiusence diligentas, li komprenas la stoikismon en ĝia plej subtila esenco. "Bono ne estas en si mem la pura vesto, sed la prefero donita al pura vesto. Ĉar la bono ne estas en la aĵoj, sed en la elekto. Honestaj estas niaj agoj, ne la materio de niaj agoj."

Sed, iafoje, li pli aspektas kiel advokato de stoikismo, ol kiel stoikisto. Oratoro sur la forumo, aŭ pli-ĝuste aktoro sur scenejo, li streĉiĝas, rigidiĝas, krias tra masko. Kio fariĝas la helena rideto kaj naturo, kiam tiu Hispano-romano defias fortunon kaj ĝin provokas al batalo ? La luktisto estas preta; li postulas cirkonstancan, kiu ebligu al li provi sian forton kaj sian virton. La kompatindulo ! Li do ne scipovas harmoniigi la malgravajn materiojn kaj batali la mallumajn batalojn...

Kontraŭe al la stoikista ortodokseco, - ekzistas nur unu virto, kiu ĉiam same agadas, kaj kies nomoj nur varias laŭ la materio, al kiu ĝi aplikiĝas - Seneko longe laŭdas - ĉion li longe faras - la specialajn preceptojn kaj ilian raran efikecon. Kaj li ne konas la perspektivojn. La konsilo, kiun li donas, estas ĉiam ĉefa; la temo, kiun li pritraktas, ŝajnas al li la plej grava, la sola grava. Kiam li laŭdas amikecon, amikeco ja fariĝas la suverena bono. La saĝon mem, se li devus sola ĝin posedi, li forĵetus. Tiuj deklaroj, kiujn vera stoikisto trovas malsaĝaj, obstrukcas la sesan leteron al Lucilio. Kompreneble, tiaj troaĵoj pagiĝas per baldaŭaj kontraŭdiroj. En la naŭa letero, Seneko fiere, preskaŭ sovaĝe deklamas : "Kiu estas kontenta de si mem, tiu

neniam povas esti sola. La saĝulo sufiĉas al si mem, neniu bezonas".

Tio estas pardoneblaj kulpoj, eble dependaj de la maniero de la verkisto pli ol de la karaktero de l'homo. Ili tamen ne preterlasas maltrankviligi pri la karaktero mem, timigi pri ebla manko, se ne je veremo, almenaŭ je profundo kaj solideco.

Jen io pli grava. En mil lokoj Seneko kondamnas sklavecon, mokridas nobelecon, malŝatas monon, priridas pompon. Lia ornamita kaj babilema elokventeco volonte longe restas kaj amuziĝas en tiuj gurditaĵoj. Ho ve ! eĉ pri tiuj elementaj punktoj, okazas, ke li sin kontraŭdiras. Li volas, ke oni estu bonkora al la sklavoj, sed tiu stranga individuisto malpermesas, "ke oni diru, ke li vokas ilin al liberiĝo, kaj ke li deziras renversi la mastrojn de la alto, kiun ili okupas". Ofte stoikista en la belaj ĝeneralaĵoj, la apartaj kazoj trovas lin tre kompromisema. Lucilio deziras fari sur homo danĝeran eksperimenton. Seneko, afabla konscienc-gvidanto, rekomendas al li : "Risku nur la plej malgrandan el ciaj sklavoj".

Oni trovas, en la kvara volumo de De Beneficiis, ja kuriozan akcepton pri nobeleco kaj denaskaj privilegioj. "Mi eĉ donus certajn aferojn, tion mi ne neas, al malindaj personoj, en konsidero pri aliaj personoj. Tiel, en la elektado por publikaj funkcioj, ilia nobeleco preferigis malbonfamulojn al homoj kapablaj, sed novaj... Kial la Providenco donis la imperion de l'mondo al Kaligulo, tiu viro tiel avida je homa sango, ke li ĝin fluigis antaŭ siaj okuloj, kvazaŭ li estus ĝin trinkonta ? Ĉu ci kredas, ke al li ĝi donis la potencon ? Ĝi donis ĝin al lia patro Germaniko..." Stranga Providenco !

Liaj laŭdoj al malriĉeco - iom ridindaj ĉe homo, kies havaĵo atingis kvardek milionojn de nia mono, ĉe homo, kiu kredeble praktikadis procentegon, kaj kiun Diono Kasio akuzas sen malverŝajno, ke li kaŭzis la britanian militon per sia akra postulado pri plena kaj tuja repago de sia kapitalo sen permesi, ke liaj ŝuldantoj liberiĝu en pluraj fojoj - tiuj burleskaj laŭdoj havas almenaŭ tiun meriton, ke ili ne estas konstantaj. "Ni devas afekti nenium malŝaton al mono, asertas la kvina letero al Lucilio. En ĉio oni devas kondukti moderece".

Oni plenigus malgrandan volumon per trajtoj tiel mir-

igaj ĉe stoikisto. Jen estas, por ekzemplo, laŭdo de elspezoj pro vanteco. Tricent mil sestercoj (cent mil frankoj) forĵetitaj en festeno ne konsistigas, en la takso de Seneko, troan elspezon, se, anstataŭ ĝin oferi al frandemo (al la faŭko, gulae), oni oferas ĝin al rangoparado, al pompo (al honoro, li diras, honori!). Tiam, li asertas solene, "tio jam ne estas diboĉo, ĝi estas solena malavareco". Li ne estas pli severa al ebrieco ol al granda elspezo. Li asertas, ke "oni povas iafoje iri ĝis ebrieco, ne por mergiĝi en ĝin, sed por kvietiĝi per ĝi". Kaj se iuj malmulte indulgaj ri-proĉas al Katono lian drinkemon, laŭ Seneko ili igos "la akuzon honora anstataŭ Katonon senhonorigita".

La sekreton de tiuj malfortoj kaj de tiuj kontraŭdiroj mi kredas trovi en la antaŭparolo al la Naturaj Demandoj. Se oni ne estus ensekretigita en la profundoj de la scienco, tiom valorus ne esti naskita. Virto ne estas feliĉo per si mem. Ĝia rolo kaj ĝia merito estas liberigi la spiriton kaj prepari ĝin al la konado de la ĉielaj aferoj. Deklaroj skandalaj por stoikisto kiel por cinikisto, por cirenano kiel por epikurano. Sed ilin aprobus pitagorano. Seneko aspektas al mi kiel menso nature pitagorana, kiun la cirkonstancoj kondukas paroli la stoikistan lingvon kaj ludi rolon de stoikisto. Kial li konsentas al tiu misformiĝo? Tial, ke konfesita pitagorismo sekvigis, en tiu epoko, kompletan rezignon pri ĉia publika influo kaj ĉia politika agado. Male, stoikismo estas en Romo partio, kiu ebligas eksterajn ambiciojn. Ĉu Seneko ne similas al nuna anarkiisto, kiu, por fariĝi deputito kaj ministro, aliĝas al la partio plej malproksima filozofie de anarkiismo, nome al la socialista partio?

La konduto de Seneko estis juĝita tre diversmaniere. Oni scias, kian senbridan admiron al lia virto proklamas Dideroto. La impeta Dideroto ŝajnas al mi mezaĉvalora psikologo, kaj, kiam li eraras, ne duone li eraras. - La subtila La Roŝfuko (Rochefoucauld) metis ĉe kape de siaj Maksimoj figuron kun la masko de hipokriteco kaj, sube, la nomo de Seneko. Sendube, Seneko sin lasis treni al multe da mensogoj kaj grimacoj. Tamen li ne ŝajnas al mi la tipo de hipokritulo. Liaj paroloj kaj gestoj mensogas en la sama mezuro, kiel la gestoj

kaj paroloj de meza politikisto, eble eĉ en malpli granda mezuro. Seneko ŝajnas al mi la tipo de ambiciumulo : li havis ĉiujn ambiciojn, ĝis inkluzive tiu, esti filozofo kaj virtulo. Li estas avida je riĉeco kaj potenco; ne malpli je literatura kaj filozofia gloro; li estas eĉ avida, kiam li disponas liberan tempon, je moralbla belo kaj praktika saĝo. En lia unua juneco, persvadita per la paroladoj de la pitagorano Sotiono, kaj, mi supozas, altirita ankaŭ per natura inklino, li kelkan tempon abstinencis pri ĉia animala nutrado. Ni aŭskultu lin rakonti al Lucilio la sekvon de la aventuro : "Mia spirito ŝajnis al mi pli facilmovi, kaj mi ne kuraĝus nun aserti, ke ĝi ne estis tia. Ci demandas, kiel mi ĉesis. Mia juneco trafis en la regado de Tiberio. Oni tiam persekutadis iujn fremdajn kultojn. Inter la signoj de tiuj superstiĉoj, oni metis la abstinencon pri iuj viandoj. Pro peto de mia patro, kiu havis nenian malamikecon al filozofio, sed timis la denuncojn, mi revenis al miaj antaŭaj kutimoj, kaj li senpene persvadis min pli bone manĝadi". Tiu anekdoto ŝajnas al mi signifa. Seneko amas filozofion, kaj eĉ la filozofian praktikon. Sed, se unu aŭ la alia riskas malutili al lia promociado, li "senpene" rezignas. Ĉie oni retrovas lin sama, ambicia por ĉio, kio ŝajnas al li bela kaj brila. Jen li estas amanto de Julia pro snobismo; jen amanto de Agripina pro materia ambicio. Ekzilita en Korsikio, li malesperas, ke li estas malproksime de la kortego, kaj, por elpeti sian revenon, li malaltiĝas ĝis la lastaj malnoblaĵoj. Por konservi la grandan situacion fine atingitan, li multobligas la flataĉojn, la opiniŝanĝojn kaj, kiam bezone, la plej abomenindajn komplikaĵojn. Li protektigas de sia amiko Serenus la amojn de Nerono kaj Aktea; li donas, se trudiĉe, konsilojn por patrinmurdo, kaj li verkas ĝian apologion. Nekapabla malplaĉi al potenculoj, li samtempe komponas la brilan funebran laŭdparoladon pri Klaŭdio, kiun Nerono laŭtleĝas antaŭ la Senato, kaj pamfleton kontraŭ Klaŭdion, kiu, en sekreto, amuzos Neronon kaj Agripinan. Lia ambicio ne hezitas antaŭ perfido. Li konspiras kontraŭ la imperiestron kaj permesas konspiron interne de la konspiro; li ja scias, ke pluraj el liaj amikoj volas, tuj post la morto de Nerono, mortigi sian ĉefon Pisonon kaj meti Senekon sur la tronon. Malkuraĝa en mil cirkons-

tancoj, li sin montros kuraĝa, kiam la fatalo, fermita en senelirejo, jam ne permesos al li alian ambicion ol tiun de bela morto (1).

Malfacile Romano estas kompleta filozofa. Krom pro senenergieco sekve de kruda plezurĝuo, li ne scias rezisti al la tento agi. Sub la Imperio, la malkuraĝaj rifuĝas en tiu porka epikurismo, kiu dividas kun la helena epikurismo nur parton de la terminaro. La bravuloj estas stoikistoj. Sed kelkaj komprenas la doktrinon tiel mise, ke ili kredas trovi en ĝi instigon al politika agado.

Epikuro malpermesis al la saĝulo sin okupi pri politiko, krom se trudite. Zenono petis, ke li okupiĝu pri politiko, krom malhelpite. Sed kian malican rideton havis kredeble la subtila Feniciano, kiam li skribis tian konsilon, kaj sekvigis ĝin per tiu rimarko, ke, se oni vivas en putrinta aŭ maljusta ŝtato, estas malhelpo, kaj oni devas rezigni pri publikaj aferoj. Li ja bone sciis, la individuisto, ke ĉiu ŝtato necese estas putrinta kaj maljusta. Plie, distingante la malgrandan civiton, en kiun nin ĵetis la hazardo de naskiĝo, disde la granda civito, la kosmo, li volonte diris: "Estu utila al la Universo". Li ankaŭ eksplikis, ke ĉio, kion mi povas fari favore al la granda kaj la malgranda Respublikoj, estas doni al ili perfektan saĝulon. Ĉio tio estis tro subtila kaj abnegaciema eĉ por la plejbonaj spiritoj inter la Romanoj.

Cetere, ne konvenas kondamni ĉiujn politikajn stoikistojn tiel severe, kiel Senekon. Pluraj estas majstroverkoj iom afektaj, ankoraŭ admirindaj malgraŭ la videbla penado kaj la volo esti admirataj. Oni trovas ilin aparte en la grupo de Trazeas. Oni scias pri la heroa morto de lia bopatrino Arria kaj la ponardo, per kiu ŝi ĵus frapis sin, aletendita, tute parfumita per ekzemplo, al ŝia hezitanta edzo, kun tiu belega vorto: "Fetus, tio ne dolorigas". Epikteto konservis por ni, kun prava admiro, dialogon de rara firmeco inter Helvidio Prisko,

(1) Pri Seneko tia, kia mi lin vidas, pri Seneko la ambicia oni trovos kelkajn pliajn indikojn en la dua ĉapitro de miaj Aperoj de Ahasvero.

bofilo de Trazeas, kaj la imperiestro Vespaziano. - Trazeas mem estis la granda honestulo de la opozicio. Oni konas plurajn el liaj heroaj sindetenoj, kaj oni ne laciĝas relegante en Tacito pri lia morto iom teatrece sublimes.

Iom pli malfrue, Diono Orbuŝo strebadis samkiel cinikisto, produkti popolan edifon. Sed, anstataŭ uzadi burleskaĵojn kaj ŝercataĵojn, li faris paroladojn kun nobla aranĝo kaj emocia vortpotenco. Vera inventinto de predikado kaj unua misiisto, li kuradis de urbo al urbo kaj de vilaĝo al vilaĝo, pacigante la kverelojn, kvietigante la perfortegajn pasiojn, strebante vekti la konsciencojn.

Estinte longatempe retoro, li konkeris, antaŭ beletre kleraj publikoj, kun la granda famo atestita per lia kromnomo, konsiderindan riĉecon. Konvertite al filozofio, li disdonis sian havaĵon al malriĉuloj, antaŭ ol li kuraĝis predikadi virton.

Persekutite, ekzilita, trudite kaŝi, kiu li estas, li plenumadis, por vivteni sin, plej penigajn taskojn en romana militendaro en Getiko. Alvenas informo pri la morto de Domiciano kaj proklamo en Romo de lia sekvanto. Pro vanteco, kaj ankaŭ por kontentigi kelkajn pli materiajn interesojn, la getika legio volas imperiestron, kiu estu ĝia kreitaĵo. Ĝi pretiĝas por marŝi kontraŭ la urbon. Diono eksaltas sur la altaron, kriante verson el Odiseado :

"Fine la saĝa Odiseo forlasis siajn ĉifonvestojn".

Li sin konatigas, kaj li laŭdas al la kolerfrenezaj soldatoj la bonfarojn de paco. La krioj ne superas lian potencan voĉon, la batoj ne silentigas lian obstinan voĉon. Kun disŝiritaj vestoj, kun sanganta vizaĝo, videble preta por absoluta martiriĝo, li krias : "Aŭskultu min. Ne ĉiutage vi trovos homon, kiu libere alportas al vi veron. Libere, lojale, sincere, sen kaŝita penso, sen ambicio, sen avido, kun la sola deziro bonfari, kun ankaŭ la firma intenco venki por via feliĉo aŭ morti sub viaj batoj (1)". Laŭkutime, la insultoj neas lian sincerecon, asertas, ke li parolas pro persona intereso. Sed li :

"Kial mi mensogas al vi ? Ĉu por mono ? por laŭdoj ? por gloro ? Mi rezignis pri gloro kaj distingindaj publikoj por doni mian animon kaj mian parolon al malfeliĉuloj.

(1) vd. la piednoton (1) de p.48.

Mono ? Kiomfoje mi rifuzis tiun, kiu estis al mi proponita. Kaj kiam mi eniris en la veran vivon, tiam mi disdonis al malriĉuloj ĉion, kion mi posedis. Se restus al mi io, mi ankoraŭ ĝin fordonus".

Sukceso kredeble unika ! la kuraĝo, la akra pacienco, la obstina persistemo, la elokvento arda, sed, eĉ sub la batoj, noble ritmita, mirigas la soldatojn, produktas heziton, poste persvaden. "La tre sincera profeto de la senmorta naturo" (2) konvertas al paco tutan armeon. Diono Orbuŝo havas tiun ununuran gloron, ke, sen ekstera aŭtoritato, per sia sola parolo kaj sia sola kuraĝo, li haltigis komenciĝantan militon (3).

Antaŭ Diono, la honesta Musonio, majstro de Epikteto, estis provinta saman miraklon. Sub la remparoj de Romo, li volis ekspliki al la soldatoj de Vespaziano la bonfarojn de paco kaj la krimajn frenezaĵojn de milito. Musonio eble egalvaloris Dionon per la karaktero; li ne havis alian elokventon kaj la mirigajn rimedojn de lia parolo. Li malsukcesis, kiel preskaŭ ĉiam oni malsukcesis en tiaj senesperaj provoj; li devis rezigni pri tio, kion Tacito nomas "malĝustatempa saĝo". Ĉu Epikteto pensis pri la du aventuroj entreprenitaj per sama kuraĝo kaj trafintaj tiel malsamajn rezultojn, kiam li energie emfazis la "Konu cin mem" : "Kiel ĉiu povos scii, kion li kapablas? - Kaj kiel la taŭro, kiam alvenas leono, sentas sola la forton, je kiu li estas dotita, kaj sola antaŭeniras por defendi la gregon ?"

Epikteto estus dezirinta vivi kiel Diono, samtempulo, kiun li amas kaj admiras, kiel Sokrato kaj kiel Diogeno. Li estus dezirinta proklamadi la veron en la lokoj, sur kiuj kunvenas la popolo. La provoj de lia ĵuneco instruis lin, ke li ne estas dotita por tiu servo, kaj li reĵetis sin al la skola instruado. Sed tiu stoikisto bedaŭras, ke li ne posedas la dotojn ebligantajn popolan agadon. La

(1) Ni ne konas la improvizaĵon de Diono antaŭ la soldatoj. Mi rekonstruas tiujn probablajn fragmentojn tradukante, (kun tre malgravaj modifoj) du pecojn pruntitajn el la 1a kaj el la 32a paroladoj de Diono Krizostomo (Orbuŝo)

(2) Mi laŭvorte tradukas titolon, kiun plurfoje donis al si Diono Orbuŝo.

(3) Mi esperas baldaŭ publikigi la romanon de Diono Orbuŝo. (Ĝi aperis en 1934 sub la titolo: "Orbuŝo, patrono de la pacifistoj. N.d.l.tr.)

saĝulon de liaj revoj, aktivan kaj potenčan, li ofte nomas : la cinikulo. "Li estas la patro de la homaro". Kaj aliloke : "Li estu batata kiel azeno, kaj, kiam li estas batata, li amegu, kiel frato kaj patro de ĉiuj homoj, tiujn, kiuj lin frapas".

Tiu stoikisto pro nekapablo esti cinikisto, estas tamen, por la posteularo, la tipa stoikisto. Tiuj, kiuj post li sin proklamas anoj de l'Portiko, nomas lin kiel sian majstron, kaj citas lin pli ofte ol Krizipon aŭ Zenonon. La tuta stoika moralo ŝajnas al ni resonado de liaj sentoj kaj eĥo de liaj paroloj. Laŭ li oni eksponas, kaj ja konvenas eksponi la grandan etikan doktrinon de stoikismo, la doktrinon pri la indiferentaj aferoj. Ĝi datiĝas de la origino de la sekto, kaj ni jam renkontis unuan formon de ĝi. Sed Epikteto ĝin esprimas kun nova forto, kaj faras el ĝi la centron de ĉiu estonta stoikismo.

Ĉion, kio ne dependas de mi, mi nomas indiferenta afero. Tiu difino, ja certe, estas unue vola ago; sed ĝi estas unu el la fortoj, kiuj subtenos min. Ĝi unue signalas realigendan celon; baldaŭ ĝi diras subjektivan realaĵon. Cetero, ĝi ĉiam diris objektivan veron, kaj ke tiuj aferoj ne niom kontribuas al la feliĉeco kaj al la harmonio de mia estaĵo.

La aferoj de mi dependaj estas miaj opinioj, miaj deziroj, miaj inklinoj, miaj abomenoj, per unu vorto ĉiuj miaj internaj agoj. La aferoj de mi ne dependaj, la indiferentaj aferoj, estas la korpo, la riĉaĵoj, la reputacio, la altoficoj, per unu vorto ĉio, kio ne apartenas al la ardo de miaj internaj agoj.

La stoikismo de Epikteto restas, oni ja vidas, sokrata filozofio. "Konu cin mem" estas en ĝia fundamento. Saĝo, strebado por realigi la tutan bonon de mi dependan, indiferento kontraŭ ĉio de mi ne dependa, sin apogas sur kritiko de la volo. Pozitivista scienculo, por doni tutan sian inteligenton al koneblo, malinteresiĝas pri la nekoneblo. Disĉiplo de Epikteto, por doni tutan sian penadon kun efikeco, malinteresiĝas pri la neblo. Epikteto esence faras el la stoikismo pozitivismon de la volo (1).

(1) Mi pie desegnis portreton de Epikteto en Kristanej kaj Filozofoj.

Mi emus ŝlosi ĉi tie la historion de la individuista filozofio en antikveco kaj deklari, sen timo pri kontraŭdiro, ke Epikteto estas la lasta granda nomo de l' stoikismo. La ridindaj kapricoj de la gloro ne permesas tiun justaĵon. Mark-Aŭrelio ja estas, por la historiistoj, filozofo.

Tiu miriga juĝo ŝajnas al mi eksplikebla nur per la vanteco de la homoj, kiuj tenadas plumon; flatitaj pro tio, ke ili havis kunfraton sur trono, ili estus vunditaj en sia memestimo, se ili konfesus la mezaĉecon de la imperiestro verkisto. Nu, Mark-Aŭrelio, kiu havas nek la ardan kaj profundan sincerecon de Sokrato, de Diogeno, de Kleanto, de Diono, de Epikteto, nek la filozofian genion de Krizipo, nek la literaturan genion de Seneko, interesas veran filozofon nur kiel kazo. Li kolorige antaŭmetas la politikan problemon: ĉu filozofo povas konsenti regi? Li instruas, melankolie ebria heloto, ke filozofa imperiestro estas nevivipova monstro, kaj ke necese la registo formangos la filozofon. Sed mi studis, en la 3a ĉapitro de la Aperoj de Ahasvero, la internan kontraŭdiron, kiu detruis, pense kaj karaktere, la kompatindan Mark-Aŭrelion. Mi petegas, ke oni evitigu al mi la penon refari tiun taskon. Tiu viro disigita de si mem, kaj, ne sen ia malkuraĝo de inteligento kaj volo, lasanta la cirkonstancojn transformi lin en moralan ruinon; tiu viro, kiu ne konservas alian noblecon ol la plej inertan el la bedaŭroj, kaj kiu fine solvas per sinmortigo la malfacilaĵojn, kiujn li konsentis, ne estas el tiuj, kiujn mi tre deziras frekventi.

Post li, la stoikismo estas ankoraŭ senmotive certigita, se tiel diri, de la juristoj. Samkiel, inter du bataloj, Mark-Aŭrelio amas deklari, ke milito estas "de la vidpunkto de principoj", rabistaĵo; same la romanaj juristoj, antaŭ ol starigi pozitivajn leĝojn pri la statuto de la sklavoj, volonte konsentas al si la malgrandan lukson deklari en abstrakto, ke sklaveco estas absurda, kaj ke ĉiuj homoj havas, denature, egalajn rajtojn.

Sed, se pravas la individuismo, kiu, depost la sofistoj, kontraŭmetas leĝon kaj naturon, kia idea konfuzo povas konduki iujn homojn eldiri individuistajn opiniproklamojn, dum ili fabrikas leĝojn kaj zorgas pri ilia aplikado? Kiel ili ne sentas, ke la sola fakto formuli aŭ subteni

tion, kion la malŝato de Epikteto nomas "la leĝoj de l' mortintoj", ekzilas ilin for de ĉia individuismo, de ĉia kompreno pri naturo, de ĉia respekto al tio, kion Sokrato nomas "la ne skribitaj leĝoj", kaj Epikteto "la leĝoj de l'vivantoj" ?...

Fina noto.

Mi scias la mankojn kaj la nesufiĉaĵojn de tiu libreto. Kelkaj venas de mia malkapablo; aliaj de eksteraj necesoj.

Propravole mi enfermis min en la cirklon mallarĝan sed luman de la klasika antikveco. Mi limis min en la individuismo de l'filozofoj, neglektante la poetojn kaj ankaŭ la religian individuismen. Mi flankelasis interesajn faktojn, kaj nomojn indajn je famo. Volante esti de ĉiuj komprenita, mi evitis la tro malfacilajn eksponojn. Eĉ en la partoj pritraktitaj, mi konsentis multe da malleĝo kaj kapricoj. Mi forigis tion, kion mi jam diris en aliaj libroj, eĉ kiam estus bone ĝin diri ĉi tie. Ĉiuj pretekstoj servis al mi por malriĉigi tro riĉan materialon.

Tia, kia ĝi estas, tiu ĉi libreto eble ne estos senutila por la nekleruloj, kiuj konas sian neklerecon.

Mi dezirus, ke ĝi utilu ankaŭ al tiuj, kiuj, ĉar ili legis kelkajn historiojn pri filozofio, kredas ion scii. La senpera legado de la originalaj tekstoj montris al mi, ke ĉiu instrulibro estas amaso da eraroj. Kia ĝojo, se mi inspirus al kelkiuj necesan malfidemon antaŭ la peraj verkoj; se mi donus al kelkiuj la deziron iri mem vidi, antaŭ ol aserti aŭ nei... Jen estas la rara sukceso, kiun mi deziras al mia sincereco kaj al la sincereco de la leganto.

Fino.

Tabelo de la cititaj nomoj

- Agripina 45.
 Aktea 45.
 Alcibiado 21.45.
 Alcidamaso 11.
 Aleksandro 13.34.
 Antisteno 7.29/32.
 Anitus 16.
 Aristipo 19.21/24.27.
 Aristofano 9.17.18.
 Aristotelo 10.11.13.33.
 Arria 46.
 Aùgusto 28.
 Bossuet 15.
 Brunetièrè 6.
 Châteaubriand 15.
 Cicerono 10.24.
 Ciruso la Juna 13.
 Courier (Paul-Louis) 15.
 Daudet (Léon) 15.
 Demokrito 24.
 Dideroto 44.
 Diogeno el Sinopo 29.31/34.
 48.50.
 Diogeno Laerco 16.23.24.31.
 Diono Kasio 43.
 Diono Krizostomo aù Orbuŝo
 47/48.50.
 Domiciano 47.
 Dupréel (Eugène) 10.11.21.
 Eforo 13.
 Epikteto 6.22.46.48/51.
 Epikuro 6.21.24/26.28.40.46.
 Eskino (la Sokrata) 19.
 Evhemero 23.
 Faguet (Emile) 6.
 Fenelono 14.
 Follin (H.L.) 8.
 Germaniko 43.
 Gorgias 9/11.29.
 Hegesias 23.
 Helvidio Prisko 46.
 Heraklito 34.
 Herodoto (la epikurana)
 24.25.
 Hiparkia 35.
 Hippias 10.11.
 Horacio 28.
 Hugo (Viktoro) 15.
 Habrias 16.
 Idomeneo (la epikurana) 27.
 Julia 45.
 Kaligulo 43.
 Kallikles 11.12.17.40.
 Kanto 5.10.
 Katono 44.
 Klaudio 45.
 Kleanto 36.37.39.50.
 Krates 32.34.35.
 Kritias 19.
 Kritono 19.
 Krizipo 37.39.49.50.
 Krobilo 16.
 Ksenofono 9.11.13/18.21.22.
 Lamartino 15.
 La Rochefoucauld (Roŝfuko)
 44.
 Leono el Salamino 18.19.
 Leùcipo 24.
 Likofrono (la Sofisto) 12.
 Lisias 16.
 Luciano 32.
 Lucilio 42.43.45.
 Lukrecio 24.28.

- Malebranche (Malbranço) 5.
 Mark-Aùrelio 50.
 Melitus 14.16.
 Meneceo 24.25.
 Menipo 32.
 Musonio Rufo 48.
 Nerono 45.
 Niçe 6.8.12.24.38.
 Paùlo (Sankta) 15.
 Peregrino 32.
 Petus 46.
 Pitokles 24.
 Platono 9.11.13/20.25.29.
 Polemono 35.
 Polikrato (la retoro) 14.16.
 Prat (Louis) 8.
 Prodikus 12.17.
 Protagoras 10.11.
 Seneko 28.41/46.50
 Serenus 45.
 Sofoklo 28.
 Sokrato 6.8/10.12/22.25.
 29.30.34.48.50.51.
- Sotiono 45.
 Spinozo 5.
 Stilpono 35.
 Tacito 47.48.
 Temistogeno el Sirakuzo 13.
 Teodoro la Ateisto 23.
 Teofrasto 36.
 Tiberio 45.
 Timono la Silografo 21.
 Trazeas 46.47.
 Trazimako (la Sofisto) 11.
 Tucidido 5.
 Vespaziano 47.48.
 Zeller 12.
 Zenono el Cittio 33.35/37.
 39.40.46.49.
 Zenono el Eleo 29.

Glosoj

- entimemo - etimologie : kion oni havas en la penso; tio, kio restas ene esprimita. Silogismo, en kiu unu el la premisoj estas subkomprenata (PIV).
- miletaj fabeloj : folkloraj rakontoj, spritaj kaj ofte erotikaj, kunmetitaj de Aristido el Mileto en la 2a jc. a.K., kaj imititaj de Petronio, Apuleo, Bokaço...
- Portiko : la stoika skolo (PIV.2)

Tabelo de enhavo

Antaŭa noto	...3
Enkonduko	...5
Ĉapitro Ia : La Sofistoj	...9
Ĉapitro IIa : Aristipo kaj la Cirenanoj	..21
Ĉapitro IIIa : Epikuro	..24
Ĉapitro IVa : La Cinikistoj	..29
Ĉapitro Va : La Stoikistoj	..33
Fina noto	..51
Tabelo de la cititaj nomoj	..52
Glósosj	..53

De Han Riner, en la sama serio (trad. Valo):

- La Kvina Evangelio
- Individuista Manlibreto

ĉe : La Juna Penso, F 47340 Laroque Timbaut.

Imprimeur : Baudé, F 47340 Laroque Timbaut.

En la broŝura serio de "La Juna Penso":

- Lanti: Absolutismo (prelego)
Levreaud: Atomcentraloj (debato)
J. Duboin/PV. Berthier:
Abundo kaj konsumsocio
Malatesta: Anarkio k organizo
H. D. Thoreau: Civila Malobeemo +
H. D. Thoreau (Bazalgette)
Masson: Esperanto or English?
Espéranto en 24 pages (franc.)
Espéranto en 24 páginas (hisp.)
Lanti: El leteroj de E. Lanti
Krishnamurti: Eduko kaj
vivsignifo + Rimarki
Lanti: Herezulo - Herezaĵo
Pannekoek: Historia Materiismo
+ Pri la problemo de organizo
E. Relgis: Humanitaristaj
Principoj
Han Riner: Individuismo en
Antikveco
An Kaù: Initiation à l'espéranto
(en la franca)
Informkajero pri la lab. esp.
Han Riner: Individuista
Manlibreto
B. G. D.: Jen la Dio!
Dakapo: "Kiĉuaro" al Junulkurso
S. Faure: La Krimoj de Dio
Han Riner: La Kvina Evangelio
Lanti: La laborista esperantismo
La liberecana penso (citaĵoj)
Pontaura/J. Grave:
Liberecanaj vivkonceptoj
La Boétie: Memvola servuto
Bartelmes: Mia vivo + Poemaro
Leo Tolstoj: Ne mortigu!
Roza Luksemburg:
Naciecaj problemoj
S. J. Lec: Nekombitaj pensoj
- Ebert: Ĉu neperforta revolucio?
E. Bellamy: Parabolo pri
la cisterno
Lanti: Pri edukado
Lafargue: La rajto de pigro
Cohen: Paco en proksima oriento
Por la paco (citaĵoj)
Domela Nieuwenhuis:
La piramido de l'tiranismo
Kropotkin: Revolucia registaro
+ Anarkista agado en la rev.
Masson: Du rêve à la réalité:
l'espéranto
Schmid: La rentumo, kiun ni pagas
J. Burger: Rido sanigas!
Masson: Tabakismo kaj
emancipiĝo
Ingenieros: La triviala homo
J. Rostand: Tiu, kiu ne volas
morti
Alfa-Beta: Tra la mondo per
biciklo kaj esperanto
Schneller: Vivi en komunumo
- En preparo:
Pannekoek: Antropogenezo
J. London: La forto de la fortaj
Leo Tolstoj: Patriotismo kaj
registaro
Lanti: Elektitaj tekstoj
Espéranto em 24 páginas
(por portugallingv.)
Gandhi kaj satjagraho (reeldono)
Durruti, simbolo de la hispana
revolucio (reeldono)
Rufegon: Manlibro de nova homo
(reeldono)
Prognozio (novelaro el la pola)
Poŝvortaro (por franclingvanoj)

Abonoj: minimume 20 FF al : La Juna Penso, F 47340 Laroque
Mendoj: peti prezliston. pĉk: 3 374 04 M, Bordeaux.